

V-19479/46

(1977)

Bulgara ESPERANTISTO





La kurso de s-ano K. Karev (vd. paĝon 11)



Rekontiĝo inter esperantistoj de Stara Zagora, Plovdiv, Jambol (vd. paĝon 12).

Junaj esperantistoj, membroj de RMS, ekskurse. Sidante ili formas la literon E. La dua en la dua vico dekstre estas Botju Penev (vd. paĝon 8).



ENHAVO

Kunĉo Vălev. Nia instrulaboro — je pli alta nivelo!	1
Vasja Petrova. Plenkunsido de CE de BEA	3
* * * Eterne kune!	3
Ĥristo Gorov. Impona kongreso	4
Milan Zornicov. En la lingvo de la paco	5
Dimitro Haĝiev. La socialismo kaj la kulturo estas nedisigeblaj	6
* * * La bulgara volontularo	7
Ivanka Vangelova. Rememoroj pri Botju Penev	8
Krăstju Karucin. La organiza laboro — premiso de novaj sukcesoj	9
* * * Laŭdinde!	11
Goĉo Koev, Marin Kisjov. Solene finitaj Esperanto-kursoj	11
Dime Trudoljubov. Interdistrikta E-renkontiĝo en Stara Zagora	12
ZO. Granda E-renkontiĝo apud Rila	12
* * * Brila sukceso de Esperanto en la ĉefurbo de la rido	12
Kovg. Neforgesebla ekskurso	13
VI. Izosimov. Esperanto-renkontiĝo en Permĵ	14
Boris Anohin. Esperanto-renkontiĝo en Kazahio	14
* * * Kunlaboru kun kulturklerigaj domoj el Sovetunio!	14
Aurel Boia. Universitata agado en Rumano	15
G. R. L. P. Simpozio pri lingvaj baroj	16
Ljubomir Ognjanov—Rizor. Granda amiko de la bulgara popolo	16
* * * Regularo pri aljuĝo de titoloj al E-instruistoj	17
Ivan Vazov. La volontuloj ĉe Ŝipka. Trad. Petro Edrev	19
Nikolaj Hajtov. La Kapra Korno. Trad. D. Haĝiev	19
Stefka Malĉeva. Al Jurij Gagarin	23
Elin Pelin. Feina birdo. Trad. Asen Grigorov	24
Rajno Ĉipilev. La standardportanto	25
Ivan Vazov. Ni laboru! Trad. Simeon M. Simeonov	27
Stefan Sokolov. Renkontiĝo kun Ivan Vazov	27
L. Bojaĝieva. En la fabela silento	29
Arjenc kaj A. Tonti. Diru tri vortojn	29
D-ro Stefan Kadiev, ing. Daĉo Daĉev. La energetika giganto „Bobov Dol“	29
Nevena Nedelĉeva. Ĉe la pordo de esperantista klubejo	30
Penka Papazova. Ne diru al mi	31
Toma Ajolov. Sovaga naturo	31
Stojan Kostadinov. Matenigas	31
Dimitro Denĉev. La nova „Kolektanto“	32
N. Aleksiev. Forpasis Ljuba Grigovova	III
* * * Proponu la plej bonan tradukon!	III
Vladimir T. Georgiev kaj Nekonato. Ni gardu la paco!	IV

Sur la kovrilpaĝo:

Amika manpremo inter L. I. Brejnev kaj T. Ĵivkov

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29

**NIA INSTRULABORO — JE PLI ALTA NIVELLO!**

Plej grava tasko de Bulgara Esperantista Asocio estas disvastigi la Internacian Lingvon Esperanto inter ĉiuj tavoloj de nia popolo. Klare konsciente tion la Centra Estraro, la distriktaj kaj societaj estraroj kaj la Instruista Sekcio konstante klopodas por bone organizi la instrulaboron.

Dum la pasinta lernojaro multo estis farita sur tiu kampo. Sukcese funkciis la tutjaraj korespondaj kaj la unusemajnaj vintraj kaj printempaj kursoj. En 1977 j. pli bone ol ĉiam estis organizitaj kaj pli amase vizititaj la Internaciaj Kursoj por Instruistoj de Esperanto en Burgas, apud Nigra Maro.

La ĉeestaj civitanaj kaj lerneaj kursoj montris certan aktivecon. Bedaŭrinde, niaj informoj pri ili ankoraŭ ne estas plenaj, malgraŭ niaj petoj, ĉar kelkaj societaj kaj distriktaj estraroj neglektas la informadon. Grava manko de nia instrulaboro: estas organizataj malmulte da kursoj por progresintoj kaj aliaj formoj por perfektigado en la lingvo, kvankam por ĉiuj estas klare, ke sen tiaj kursoj kaj formoj ni ne povas havi bonajn uzantojn de la Internacia Lingvo.

Grava akiraĵo en la pasinta lernojaro estis la apero de nova lernolibro por elementaj kursoj, bazita sur la principoj de la nuntempa lingvoinstruado. La lernolibro (eldonkvanto de 15 000) elĉerpiĝis tre rapide: nur post deko da tagoj ĝi ne plu estis aĉetebla. Tiu fakto elokvente parolas pli la granda intereso al Esperanto en nia lando.

En sia strebado enporti pli da organizateco en la instrulaboron de Esperanto la CE kaj la Instruista Sekcio de BEA ekde januaro komencis aperigi bulgarlingve informilon pri nia instrulaboro en lernejoj kaj societaj kursoj, kiun oni renkontas kun intereso. Por ke la informilo fariĝu efika faktoro de nia instrulaboro oni devas regule kunlabori al ĝi.

Kun la sama celo — pli serioze diskuti la atingojn kaj la mankojn de nia instrulaboro, same — plialtigi la metodikan nivelon de la E-pedagogoj, ekde junio la CE kaj la Instruista Sekcio alpaŝis al organizado de regionaj interdistriktaj pedagogiaj konferencoj. Jam okazis kvar tiaj konferencoj — en V. Târnovo, Stara Zagora, Plovdiv kaj Blagoevgrad; antaŭstaras ankoraŭ du en la dua duono de septembro — en Ŝumen kaj Vraca. Tiuj konferencoj efike kontribuas por plivigligo kaj plibonigo de nia instrulaboro, tial ili fariĝos konstanta agadformo.

Kiu estas nun la plej grava tasko de nia instrulaboro?

Sendube, tio estas la bona plano, por kies efektiviĝo oni streĉe laboru kaj — se necese — batalu dum la tuta nova lernojaro. Tian planon ĉiu distrikta kaj societa estraro devis ellabori tuj post la pedagogiaj konferencoj. Se iu estraro ne faris tion ĝustatempe, ĝi faru ĝin tuj, senprokraste. Nur tiel oni povas esti siatempe preta por bone renkonti la novan lernojaron kaj ekagi

plenforte jam ĉe ĝia komenciĝo je la unua de oktobro. En la planoj oni neniel devas enskribi ĝeneralajn frazojn kaj bondezirojn, sed nur konkretajn taskojn kun klara indiko — kiu, kie, kiam devas fari tion aŭ alion.

Por esplori la eblecojn pri organizo de E-kursoj en grandaj oficejoj, entreprenoj, fabrikoj, sciencaj institutoj k. a. la societaj estraroj devas uzi la helpon de grupoj el 2—3 aktivuloj, kiuj vizitu fiksitajn lokojn, klarigu al la gvidantoj la celojn kaj la taskojn de nia lingvo kaj Movado, atentigu ilin pri la profesia utilo, kiun oni povas havi kaj havas kontaktante kun samprofesiuloj el diversaj landoj, substreku la rolon de Esperanto kiel efika praktika rimedo por eduki en spirito de humanismo, amikeco, kunlaboro kaj paco inter la popoloj. Same oni substreku la patriotisman laboron de la esperantistoj serve al la nacia kulturo, al nia socialisma patrolando kaj libera popolo. Sammaniere oni procedu ankaŭ en la lernejoj. Se niaj aktivuloj saĝe, realisme kaj konkrete parolos pri tiuj tre pozitivaj momentoj de nia E-laboro, supozeble ili trovos verdan straton por Esperanto.

Post la akiro de favora rilato al Esperanto ĉe la gvidantaro de entrepreno, oficejo aŭ lernejo niaj aktivuloj iru al la laborkolektivoj mem kun konciza alvoko kaj sciigoj pere de radioreto, kun mallonga paroladeto je la fino de ofica aŭ organiza kunveno, oni pendigu afiŝojn, sloganojn ktp. Por grandaj laboristaj kaj instruistaj kolektivoj oni klopodu organizi memstarajn kursojn — tio estas plej favora kondiĉo por bona marŝado de la instruado. Se tamen la kandidatoj por kurso ne estas multaj, oni kunigu ilin el 2—3 kolektivoj proksime laborantaj. Kompreneble, oni organizu ankaŭ ĝeneralajn kursojn por la tuta loĝantaro — en la societa aŭ alia klubejo. Ĉiam oni atentu, ke la kursejo estu sufiĉe agrabla kaj bone hejtita. Sur la afiŝoj pri la kurso oni tute klare indiku, kie kaj kiam komenciĝos la lecionoj, kiu estos la gvidanto, kie oni anticipu devas enskribiĝi, kiom estas la kursa kotizo ktp. Oni nepre organizu ankaŭ kursojn por progresintoj — tio ĉiam estas grava, des pli nun, kiam antaŭstaras la du grandaj kaj gravegaj eventoj — UK de Esperanto en Varna kaj la Kongreso de TEJO en Veliko Târnovo en 1978. Sen bona posedo de la lingvo oni ne povas plenvale kontakti kun la eksterlandaj gastoj el ĉ. 50 landoj el la tuta mondo.

Estas konata la fakto, ke nur en kurso oni ne povas plene ekposedi fremdan lingvon. Tio, kompreneble, en malpli granda grado, validas ankaŭ por Esperanto, malgraŭ ke ĝi estas la plej facila lingvo en la mondo. En kurso oni nur konatiĝas kun la gramatika strukturo de Esperanto kaj alproprigas certan parton de la leksiko. Tial la esperantistoj devas daŭre perfektigadi sin ankaŭ post la kursoj — legadi esperantaĵojn, korespondi internacie, partopreni la societajn kunvenojn, belartajn programojn, promenadojn kaj ekskursojn, E-renkontiĝojn ktp. Tre fruktodona formo por lingvoperfektigo estas la t. n. ĵurnalo parolata. En la klubejo kaj ĉie, kie kolektiĝas esperantistoj, devas soni nur E-parolo. En la klubejo devas pendi impona slogano: „Kun esperantistoj parolu en Esperanto!“ Kompreneble, la persona ekzemplo de la estraranoj, kursgvidantoj kaj E-veteranoj estas pli efika ol ĉiu slogano. La tuta eksterkursa instrulaboro ankaŭ devas trovi sian lokon en la agadplano.

Ni aparte atentigas: la taskoj pri varbado de novaj kursanoj, pri certigo de oportuna kursejo, pri pago al la kursgvidantoj ks. estas tre gravaj kaj sufiĉe pezaj por esti solvataj nur de la esperantistoj. Tial la estraroj nepre serĉu kunlaboradon kaj helpon de estraroj de aliaj amasorganizaĵoj —, Komsomolo, Sindikatoj, Patrolanda Fronto, turistaj kaj sportaj societoj, kulturdomoj (legejoj) ktp.

Gravegan malfacilaĵon en la nuna stadio prezentas la manko de sufiĉaj



Je la 30-a de majo en Sofio okazis Plenkunsido de la Centra Estraro de BEA. Krom la membroj de CE la Plenkunsidon partoprenis ankaŭ: la prezidantoj kaj la sekretarioj de DE de BEA; la estraranoj de la E-sekcioj de BEA; la estraranoj de la ĉefurbaj E-societoj; la membroj de la organizaj komitatoj de 63-a UK kaj 34-a kongreso de TEJO. Estis proponita jena tagordo:

1. Entreprenoj por preparo de la 63-a UK de Esperanto en 1978.
2. Entreprenoj por preparo de la 34-a kongreso de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizaĵo (TEJO) en 1978.
3. Elekto de urbo por la 40-a jubilea kongreso de BEA.
4. Aprobo de la buĝeto de BEA por la periodo 1976—1977.
5. Organizaj demandoj.

Post la aprobo de la tagordo la ĉeestantoj respektis per unuminuta silenta staro la memoron de la forpasintaj membroj de CE de BEA post ĝia lasta kongreso — Damjan Krušev el Tolbuhin, Nikola Ganev el Karlovo kaj Enjo Daskalov el Vraca.

Pri la unua punkto de la tagordo raportis k-do Nikola Aleksiev — prezidano de LKK de la 63-a UK. Li informis, kion LKK faris ĝis nun prepare al la Kongreso, kaj kio estas farenda plu.

Pri la preparo de la 34-a Kongreso de TEJO raportis k-do Angel Todorov — sekretario de BEA.

Post la raportoj okazis viglaj diskutoj. Oni unuanime substrekiis, ke la Plenkunsido estas ĝustatempe kunvokita. Estis donitaj multaj valoraj rekomendoj pri la bona preparo de ambaŭ kongresoj. Oni substrekiis, ke la lokaj E-societoj, DE kaj CE de BEA devas aparte zorgi pri plialtigo de la lingva nivelo de la bulgaraj esperantistoj,

pri aperigo de bonaj kongresaj reklamiloj kaj E-propagandiloj, pri establo de bonaj kontaktoj kun la lokaj administracioj en Varna kaj Veliko Târnovo ktp. Apartan atenton oni donu al la demando pri bona preparo de la infana kongreseto en Varna.

Pri la kongresurbo de BEA en 1980 j. raportis k-do Kunĉo Vâlev — sekretario de BEA. Li informis, ke ĝis nun estas faritaj tri oficialaj proponoj — de Plovdiv, Sumen, Sofia. Post lia informo kandidatiĝis ankaŭ Stara Zagora. Oni detale argumentis la diversajn proponojn. Fine per voĉdono kiel dommastro de la 40-a jubilea kongreso de BEA en 1980 j. estis elektita urbo Plovdiv.

K-do Ĥristo Gorov — prezidanto de BEA raportis pri la asocia buĝeto por 1976/77 j. Li proponis, ke parto de la kolektitaj ĝis nun investoj estu uzita por aĉeto de ejo por la E-muzeo kaj por rekonstruo de la asocia kancelario. La Plenkunsido aprobis la bilancraporton por 1976, la buĝeton por 1977 kaj konsentis, ke la investa mono estu uzata por la supremenciitaj celoj.

Laŭ punkto 5 k-do Gorov anoncis la distribuon de la taskoj inter la membroj de la Buroo de CE de BEA.

K-do K. Vâlev informis pri la antaŭstaranta okazigo de 6 regionaj pedagogiaj E-konferencoj — en Veliko Târnovo, Stara Zagora, Plovdiv, Blagoevgrad, Sumen, Vraca — kaj substrekiis ilian gravan signifon por plibonigo de la Esperanta instrulaboro.

K-do Jordan Jordanov el Smoljan alvokis ĉiujn partopreni la turistajn ekskursliniojn al Pollando kaj Hungario.

Fine k-do Petro Todorov, vicprezidanto de BEA, fermis la Plenkunsidon dezirante bonan preparon kaj brilan okazigon de ambaŭ kongresoj.

Vasja Petrova

kaj sufiĉe bonaj E-instruistoj kaj kursgvidantoj. Tial en siaj planoj la societaj kaj distriktaj estraroj fiksu ankaŭ la taskon pri preparado de E-pedagogoj. Oni devas ankaŭ certigi materialan helpon por la kandidatoj studi kaj poste instrui Esperanton. Monhelpon por la kultura kaj instrua laboro oni devas serĉi ankaŭ de la popolaj sovetoj, resp. de ties ĵakoj „Kulturo“ kaj „Popola Klerigo“. Ankaŭ diversaj ekonomiaj entreprenoj povas helpi el siaj fondusoj por kulturaj celoj. La Estraro de BEA akceptis regularon pri honortitoloj de E-instruistoj — rekonitaj kaj elstaraj lektoroj. Oni apliku ankaŭ tiun regularon por stimuli la E-pedagogojn.

E-instruistoj kaj kursgvidantoj, societaj kaj distriktaj estraroj de BEA, aktivuloj, la nova lernoĵaro proponas al ni plej favorajn kondiĉojn por instrulaboro. Ni maksimume utiligu ilin! La sukcesoj dependas nur de ni mem.

Kunĉo Vâlev
sekretario de BEA pri la instrulaboro

Per tiu ĝojkrio la sovetaj homoj frate salutis la bulgaran partia-registaran delegitaron, kiu komence de junio vizitis Sovetunion frunte kun k-do Todor Ĵivkov — la unua sekretario de CK de BKP kaj prezidanto de la Ŝtata Soveto de PR Bulgario. En Kremlo k-do Ĵivkov estis honorita per la plej alta soveta titolo „Heroo de Sovetunio“. K-do Leonid Breĵnev ĉe tre solenaj kondiĉoj enmanigis al li la ordenon „Lenin“ kaj la medalon „Ora Stelo“. Per tio la Prezidio de la Supera Soveto de Sovetunio esprimis profundan estimon ne nur al nia unua gvidanto, sed ankaŭ al la Bulgara Komunista Partio, al la liberrama kaj brava bulgara popolo, al socialisma Bulgario.

En la ekskluzive fruktodonaj traktadoj de nia delegitaro kun la sovetaj partiaj kaj ŝtataj gvidantoj k-do Ĵivkov deklaris: „Ankaŭ estonte nia partio neflankigante efektivigos la linion de ĉiam pli intima kunlaborado kaj ĉiufanka integriĝo kun Sovetunio. Tio estas la ĉefa direkto de nia plua disvolviĝo al socialismo kaj komunismo. La sperto de socialisma Bulgario pruvis, ke malgranda lando kiel la nia povas sukcese disvolviĝi nur se ĝi efektivigas linion de konsekvenca integriĝo kaj proksimiĝo kun la aliaj socialismaj landoj kaj antaŭ ĉio kun la fortikaĵo kaj la kerno de la frata socialisma komunaja — la granda Sovetunio.“

IMPONA KONGRESO

En la sofia festhalo „Universiada“, kie en 1963 j. okazis la 48-a UK de Esperanto, en junio 1977 kunsidis la VII kongreso de Patrolanda Fronto — la plej amasa organizaĵo de la bulgara popolo, al kiu apartenas ankaŭ BEA kiel kolektiva membro.

Kiel oficialaj delegitoj ĉeetis tri membroj de la Centra Estraro de BEA.

Fronte al la kongresanoj pendis impona portreto de Georgi Dimitrov — iniciatinto de Patrolanda Fronto en 1942 j., kiam en nia lando furiozis la monarka-faŝista diktaturo. Sub la standardo de PF tiam batalis la bulgaraj kontraŭfaŝistoj — partizanoj, membroj de batalgrupoj ka. Inter la miloj da pereintoj en tiu batalo estis ankaŭ multaj geesperantistoj — Ĥristo Kârpaĉev, Rajĉo Kirkov, Stojan Edrev, Cvetan Spasov, Stojan Vasilev, Vârban Genĉev ka.

Nun en „Universiada“ regis atmosfero de entuziasmo. Preskaŭ du mil delegitoj el la tuta lando — laboristoj, kooperativanoj, intelektuloj — kunsidis kaj diskutis problemojn de Patrolanda Fronto.

La junulino Gergana el distrikto Smoljan rakontis, kiel ŝia vilaĝo Stomanovo renaskiĝis dum la jaroj de la popola regado. La samo validas por preskaŭ ĉiuj vilaĝoj en nia lando — la novaj domoj estas elektrokaj akvoproviziitaj, kun radio- kaj televidaparatoj, kun moderna ilaro, bone meblitaj kaj aranĝitaj. La multinfana patrino Paraskeva Baleva el distrikto Vraca ra-

kontis pri sia streĉa laboro por la infanoj kaj sur la kooperativa kampo. Sed ŝi sentas sin feliĉa, ĉar ŝiaj idoj estas sanaj, bone edukitaj, diligentaj kaj laboremaj. Tion ŝi ŝuldas al la zorgoj de Komsomolo kaj Patrolanda Fronto. Dapkova el distrikto Pazarĝik parolis pri la partopreno de la virinoj en la plenumo de la produktadaj taskoj. La brigadestro Ĵelev el distrikto Tolbuhin raportis pri la bona laboro de sia brigado en la agrokomplekso, pri la multa kaj moderna tekniko, kiun ĝi uzas — ĉio ĉi ebligas abundan rikolton.

Sur la podio alternis funkciuloj de PF, sciencistoj, verkistoj, kooperativanoj. Ili tuŝis problemojn pri la popola partopreno en ŝtataj kaj komunamaj aferoj, pri realigo de la sepa ekonomia kvinjara plano, pri respekto al la leĝoj de la socialisma ŝtato, pri ŝparemo de popolrimedoj, pri plua demokratiigo de nia socio, pri beligo de loĝlokoj ktp. ktp. Ĉiuj kongresanoj parolis pri la atingita bonstato de la vastaj popolamasoj kaj pri la ankoraŭ pli helaj perspektivoj por morgaŭ.

Neforgeseblaj restos la paroloj de gastoj el dudek landoj — socialismaj kaj nesocialismaj: Sovetunio, Pollando, ĈSSR, Rumanio, Hungario, GDR, Jugoslavio, Mongolio, Irak, Mozambik, Libano, Jemen, Sirio, Madagaskar, Koreo, Kubo, Benin, Vejtnamio, Laoso ka. Fortan indignon kontraŭ la kruela

(sekvas sur p. 6)





EN LA LINGVO DE LA PACO

La Sofia Internacia Renkontiĝo de Verkistoj

Je la 7—11 de junio la ĉefurbo de Popola Respubliko Bulgario — Sofio — fakte transformiĝis en ĉefurbon de la monda literaturo. Ĉirkaŭ 150 majstroj de la beletra el 33 landoj renkontiĝis en la „saĝa kaj gastama urbo Sofio“, kiel sin esprimis la franca verkisto André Stil. Diskutante la temon „La verkisto kaj la paco. La spirito de Helsinki kaj la devo de la majstroj de la kulturo“, tiuj elstaraj reprezentantoj de la literatura penso deklaris antaŭ la tuta nuntempa homaro, ke la estonteco de la mondo ne estas nur en la manoj de „politikistoj kaj diplomatoj“ — laŭ la esprimo de la sovetia poeto Evgenij Evtuŝenko, sed ĝi estas ankaŭ sankta rajto kaj supera devo de tiuj, kiuj kreas la kulturon kaj pro tio estas devigataj ankaŭ defendi ĝin kontraŭ detruo. Ĉar kiel estas dirite en la Alvoko por la Renkontiĝo, subskribita de la plej grandaj kaj aŭtoritataj verkistoj de la tuta mondo, „en niaj tagoj estas aparte necese, ke oni eksentu la forton de la verkista konscienco. Temas pri la paco, kiu estas minacata de la neekzistinta ĝis nun kresko de la armiloj, de la fajrujoj de milito, ekflamiĝantaj jen tie, jen tie ĉi sur nia planedo, pri la paco, kiu konservas la kulturon, la homan vivon, la kreaĵojn de la homoj, ties estontecon kaj la estontecon de la infanoj. La mondo estas dividita en landojn kaj kontinentojn, en ĝi estas multaj baroj — sociaj, politikaj, ideologiaj, lingvaj, kulturaj ka. Sed samtempe la mondo estas unueca kaj nedividebla — ĝi estas la hejmo de la homaro. La paco en tiu hejmo estas garantio por la feliĉo de ĝiaj loĝantoj. . .“

Post la kongresoj defende al la kulturo, okazintaj antaŭ kvar jardekoj en Parizo

kaj Madrido, eminentaj literaturaĵoj kreantaj el la tuta mondo kolektiĝis nun en Sofio. Malgraŭ siaj malsamaj filozofiaj, estetikaj kaj politikaj starpunktoj ili unuanime diris „Ne!“ al la milito kaj etendis manojn unu al alia en la nomo de la paco kaj homa feliĉo.

La fakto mem, ke tiu ĉi renkontiĝo okazis en Sofio, estas alta rekono de la prestiĝo de la bulgara beletra libro, de la tuta bulgara socialisma kulturo. Aprezante la kontribuon de la Unuiĝo de Bulgaraj Verkistoj por la kunvoko de la Renkontiĝo, la verkisto el Usono John Cheaver (Ĝon Ĉivar) deklaris, ke tiu unuiĝo „devas esti gratulita pro tiu ĉi tiom necesa kaj tiom sincera renkontiĝo inter ni. Ĝi estu gratulita pro la kurajo inviti 150 verkistojn el la tuta mondo por dialogo pri la estonteco de la paco. Tiu ĉi renkontiĝo estas heroo paŝo antaŭen en ĝusta direkto“. Kaj en la mesaĝo, voĉlegita de la Prezidanto de Internacia Asocio de Literaturaj Kritikistoj Robert André, estis esprimita „profunda danko al la bulgaraj kolegoj pro ilia nobla iniciato kaj varma gastamo“. „Ni esprimas la deziron, — estas dirite plue en la mesaĝo, — ke simila renkontiĝo estu sekvita de aliaj, por ke estu daŭrigita la pozitiva dialogo favore al la paco kaj por la pli bona reciproka konatiĝo kun niaj kulturaj valoraroj“.

En sia konkluda parolado la prezidanto de la Internacia Renkontiĝo de Verkistoj akademiano Pantalej Zarev, prezidanto de la Unuiĝo de Bulgaraj Verkistoj, dankis al la partoprenantoj kaj alvokis ilin: „Tiu ĉi konferenco ne finiĝu hodiaŭ, ni transportu ĝin en niajn landojn, tiel ni estos pli utilaj al la homoj kaj ni estos pli longe kun!“

Milen Zornicov



III Kongreso de la Bulgara Kulturo

Je la 18—20 de majo en Sofio okazis la III Kongreso de la Bulgara Kulturo, kiun partoprenis 1811 kreantoj de spiritaĵoj de nia popolo: verkistoj, aktoroj, komponistoj, kantistoj, pentristoj, artsciencistoj ka. Ĉeestis ankaŭ 200 gastoj-kulturagantoj el socialismaj kaj nesocialismaj landoj.

La bilanco de la bulgara socialisma kulturo, kiun la Kongreso faris, estas ĝojiga. Dum la diversaj epokoj de sia multjarcenta disvolvo la bulgara popolo kreis konsiderindan materialan kaj spiritan kulturon. Sed tio, kio estis kreita dum la mallonga 30-jara periodo de socialisma vivo de nia lando, ne havas egalon al si en nia tuta historio. Dum tiu periodo estis kreita nova, nekonata kaj nebla en la pasinteco kulturo, kulturo socialisma, kulturo popola, sange ligita al la vivo kaj la bataloj de la milionnombraj popolamasoj. Tiu kulturo ne havas pli altan celon ol la spirita kresko kaj ĉiufaceta disvolvo de tiuj amasoj, ĉar la socialismo kaj la nuntempa bulgara kulturo estas nedisigeblaj. Pri la grandegaj atingiĝoj de la bulgara socialisma kulturo elokvente parolas jenaj faktoj.

En 1976 j. en Bulgario (kun loĝantaro de 8,5 milionoj) funkciis preskaŭ 3600 kinejoj kun 115 milionoj da spektintoj, 52 dramkaj pupteatroj kun 6 mln. da spektintoj, 10 407 bibliotekoj kun pli ol 6 mln. da volumoj kaj 3,5 mln. da legintoj, 204 muzeoj kaj artgalerioj kun 15,5 mln. da vizitintoj, 17 500 amatoraj artkolektivoj kun pli ol 439 000 partoprenantoj en ties agado ktp. Estis eldonitaj 3813 libroj kun suma eldonkvanto de 49 mln. da ekzempleroj. Pro tio, kiel diris en sia raporto k-dino Ljudmila Jivkova, prezidantino de la Komitato de Arto kaj Kulturo, „ni havas ĉiujn motivojn difini la jardekojn de la socialismo ĉe ni kiel „oran epokon“ en la disvolvo de nia kulturo kaj arto“.

La III Kongreso de la Bulgara Kulturo konstatis, ke en la periodo post la II kongreso la socia-ŝtata principo de gvidado de la kulturo, kiu ĝis nun estas aplikata nur en Bulgario, plene konfirmiĝis. Estis kreita unueca nacia sistemo de gvidado de la artakrea kaj kultura agado kaj de la rimedoj de amasa informado. En tiu gvidado aktive

partoprenas la kreantoj de artaj kaj kulturaj valoraj, kio siaflanke estigas novajn, potencajn kreivajn stimulojn. Samtempe la gvidadon de la kulturaj procesoj ĉiam pli kaj pli aktive partoprenas reprezentantoj de ĉiuj sociaj grupoj. Tiamaniere la socia-ŝtata principo donas seriozan spronon al la proceso de ĉiufaceta demokratiigo de la kultura vivo. La arto kaj la kulturo en Bulgario transformiĝas, en la vera senco de la vorto, en tutpopolan aferon.

La Kongreso akceptis deklaron pri paco kaj internacia kultura kunlaborado. En ĝi oni emfazas, la signifon de la kultura kunlaboro kaj de la interŝanĝo de kulturaj valoraj inter la popoloj — potenca rimedo por interkomunikado, reciproka konatiĝo kaj pliriĉiĝo de la homoj per la plej bonaj artverkoj de nia civilizo kaj por la malstreĉiĝo en la internaciaj rilatoj.

Ne nur la bulgara socio donis altan priakson de la Kongreso kaj ĝia laboro. Tion faris ankaŭ multaj fremdlandaj gastoj.

La fama finna verkisto Martti Larni diris: „Sajnas al mi, ke la bulgara kulturo estas grava ne nur por Bulgario, sed ankaŭ por la tuta Eŭropo. Bulgario realigas tion, kio estis interkonsentita en Helsinko. La kulturo helpas al la popoloj pli bone konatiĝi reciproke.“

Steven Ransiman, verkisto-historiisto, oficiala gasto el Britujo, parolante en la Kongreso emfazis: „Ne estas alia lando en Eŭropo, kiu tiel zorgas pri la konservado de siaj monumentoj kaj pri la pliatigo de la intereso de sia popolo al la arto kaj kulturo. Mi okupiĝas pri similaj problemoj en Britujo kaj mi opinias, ke ni povas multon lerni de la Komitato de Arto kaj Kulturo en Bulgario, kiu saĝe kaj kreive plenumas tiun ĉi gravan taskon.“

La III-a Kongreso de la Bulgara Kulturo konturis la vojon al plua supreniro. La bulgara popolo estas firme konvinkita, ke sub la gvido de la Komunista Partio nia socialisma kulturo atingos novajn altojn kaj ke la strebo de la homo al beleco kaj harmonio, stimulata de la arto kaj kulturo, fariĝos ĉiam pli kaj pli baza motivo en la konduto de la homoj.

Dimitro Haĝiev

(El paĝo 4)

kaj sanga faŝista diktaturo en Ĉilio bruligis en ĉies koroj la paroloj de la reprezentanto de martira Ĉilio.

Aparte emocian scenon prezentis la apero de granda grupo de junpioniroj, venintaj por saluti la kongreson. Ili eniris svingante blujn tukojn. La kongreso renkontis ilin per daŭraj aplaŭdoj. Multaj kongresanoj havis larmojn de kortuŝo en la okuloj, vi-

dante kiel vivĝoje kreskas nia nova generacio, sekvanta la vojon de siaj gepatroj, vojon al altaj idealoj — libereco, bonstato, socialismo.

La VII kongreso de Patrolanda Fronto ankoraŭfoje brile manifestis la gravan rolon de tiu tutpopola demokratia organizaĵo en la konstruado de matura socialismo socio en nia libera lando.

Hr. Gorov



LA BULGARA VOLONTULARO

Dum la kvinjarcenta otomana jugo la bulgara popolo ĉiam revis havi propran armeon kaj komenci batalon por sia liberiĝo. Daŭrajn spurojn tiurilate postlasis la bulgaraj volontuloj en la rusa armeo dum la militoj de Rusio kontraŭ Turkio en la 18—19 jc.

Bulgaroj partoprenis en la rusa-turka milito de 1768—74 j., kiam la rusa armeo sub la komando de A. V. Suvorov atingis la fortikaĵon Ŝumen. Dum la rusa-turka milito de 1806—1812 j. la bulgaraj volontuloj formis 6 memstarajn batalionojn sub la komuna komando de la fama M. J. Kutuzov. Tiu „Bulgarskoe Zemskoe Vojsko“ havis sian standardon kaj stampilon.

Dum la sekva rusa-turka milito de 1828—29 j. bulgaraj volontuloj formis du taĉmentojn sub la komando de generalo Liprandi kaj la bulgaro Georgi Mamarĉev el Kotel, pri kiu oni scias, ke pro siaj heroaĵoj li ricevis de la ĉefkomandanto altan ordenon kaj sabron. Dum la Krimea Milito (1853—56) la bulgaroj denove formis sian armetrupon (pli ol 4000 volontuloj) kun propra standardo, kiu gloriĝis en la batalo apud Sevastopolo. Sed plej grandan partoprenon la bulgaroj havis en la Rusa-Turka Liberiga Milito de 1877—78 j.

Do la decido de la rusa komandantaro en la fino de 1876 kune kun la mobilizo de la armeo en la militdistrikto de Odesa formi ankaŭ apartan bulgaran militunuon tute ne estas hazarda. Komence la bulgaraj trupoj, konsistantaj el 3 batalionoj, estis nomitaj „piedira eskorto de la ĉefkomandanto princo Nikolaj Nikolajevič“ — por ne vekti suspekton ĉe la okcidenteŭropaj registaroj. Urbo Kiŝinev fariĝis la centro, kien koncentriĝis la bulgaraj volontuloj. La 17-an de aprilo 1877 la „ekskorto“ estis reorganizita en „Balgarsko Opâlcenie“ (Bulgara volontularo). Kiel ĝia estro estis nomita la 44-jara rusa generalo Nikolaj Grigorieviĉ Stoletov, kiu unuafoje renkontiĝis kun bulgaroj en la Krimea Milito kaj speciale dum la sieĝo de la fortikaĵo Silistra.

Post la proklamo de la milito la bulgaraj volontuloj forveturis al la rumana urbo Ploëști, kie oni organizis por ili grandan



tendaron. Ĉi tien venis novaj kaj novaj volontuloj — el ĉiuj anguloj de la sklavigita patrolando, el la bulgaraj familioj en Suda Rusio, el la elmigrintoj en Rumanio kaj Serbio — homoj de diversaj aĝoj kaj diversaj profesioj. Laŭ la informoj de tiutempuloj tio estis en sia plejmulto malriĉaj homoj, forkurintaj de siaj gepatraj domoj pro la kruelaĵoj de la turkoj. Multaj el ili estis partoprenintaj en la revolucia movado en Bulgario aŭ en la serba-turka milito de 1876 j. Inter ili estis ankaŭ bulgaraj oficiroj el la rusa armeo. Entute kolektiĝis 7444 ardaĵ patriotoj.

La slavaj bonfaraj komitatoj en Rusio disvolvis aktivan agadon por havigi vestojn kaj armilojn por la volontuloj. La 6-an de majo 1877 la ĉefkomandanto princo N. Nikolajevič enmanigis standardon al la volontuloj, donacitan de urbo Samara (la nuna Kujbiŝev), kiu poste famiĝis en la historio kiel „Samarsko Zname“ (Standardo el Samara).

La Bulgara Volontularo estis aldonita al la avangarda taĉmento de generalo J. V. Gurko. La volontuloj partoprenis ŝultro ĉe ŝultro kun siaj rusaj fratoj en la plej danĝeraj bataloj apud Stara Zagora (la 19-an de julio 1877), en la epopea defendo de Ŝipka (la 9—11-an de aŭgusto), apud Ŝejnovo (27—28-an de decembro) kaj montris eksterordinaran bravecon. Bonege prikantasi ilian heroaĵon nia popola poeto-klasikulo Ivan Vazov en sia poemo „La volontuloj ĉe Ŝipka“.

Distriktaĵ kaj societaĵ estraroj.

Ellaboru kaj akceptu konkretajn planojn pri la laborkampanjo de «Bulgara Esperantisto» por 1978 j.! Fiksu konvenajn respondeculojn! Ĉiuj ekagu energie ekde la unua tago de la kampanjo!

Ni nepre atingu 6100!



En 1941 j. en la knabina gimnazio de Veliko Târnovo estis anoncita kurso de Esperanto. Mi, juna membro de RMS¹, forte deziris lerni la Internacian Lingvon kaj atendis senpacience la unuan lecionon. Kiuj venos, konataj aŭ tute novaj homoj, kiu gvidos la kurson — tio estis demandoj, elvokitaj ne nur de scivolemo kaj deziro pri novaj konatiĝoj, sed ankaŭ de tiu bela romantiko, kiu tiam donis flugilojn al ĉiu nia iniciato, al ĉiu manifestiĝo. Al la unua leciono venis ĉirkaŭ dek junulinoj, el kiuj konata al mi estis nur unu — Anka Vasileva el v. Dedinci, regiono de Elena. Ĉiuj ceteraj estis novaj, el diversaj klasoj de la gimnazio.

La gvidanto de la kurso estis Botju Penev. Unuafoje tiam mi konatiĝis kun li. Pli aĝa, li ekde la unuaj minutoj de nia konatiĝo kondukis trankvile kaj sufiĉe memfide.

Mi rememoras tre bone la unuan lecionon. Ni ellernis la abocion kaj unuajn vortojn. Botju kunportis violonon kaj lernigis al ni Esperantan marŝon:

Ni venas en mondon
kun homama cel',
kaj gvidas nian rondon
la Zamenhofa stel'...

Fine ni ricevis instrukcion venigi novajn knabinojn. Mi ne rememoras aliajn detalojn, sed min impresis nia kursgvidanto. Malriĉa junulo, kiu ĉiutage estis laboranta kelkajn horojn en la vegetarana restoracio kontraŭ la nutraĵo, li estis bonega lernanto, scipovis ludi violonon, korespondis kun esperantistoj el la tuta mondo. Poste li montris al ni interesajn leterojn, ricevitaĵojn el Ĉinujo. En unu el ili estis ilustrita karteto, prezentanta ĉinajn knabinojn kun bombo, kiu superis ilian staturon. Ni interŝanĝis ankaŭ librojn. De Botju mi ricevis la libron „Interparoladoj kun la instruisto de filozofio“, kiun mi legis tre konscie kaj longe. Al mi estis komisiita la tasko trovi kaj aligi al la kurso du junulinojn el la dommastruma lernejo. Mi plenumis tiun ĉi taskon. Kvankam el diversaj lernejoj, mi amikiĝis kun la du junulinoj kaj poste kondukis ilin ĉien, kie ni kolektiĝis.

Post kelkaj lecionoj ni ĉiuj ornamis nin per verdaj steletoj kaj tiel promendais tra la tuta urbo. Nekonataj knaboj kaj knabinoj kun verdaj steloj sur la refaldoj haltigadis

nin kaj salutis per la kutimaj vortoj: „Saluton, kara kamarado (aŭ kamaradino)!“

Dum la printempo laŭ iniciato de la E-kurso ni faris tri ekskursojn. La unua okazis je Palmodimanĉo, destinita nur por malgranda nombro de esperantistoj RMS-anoj. La eliro el la urbo estis sekreta, helpe de severe observataj signalvortoj. Ĝi okazis ĉirkaŭ la deka horo antaŭtagmeze, kiam la preĝantoj estis forlasantaj la preĝejojn portante laŭkutime salikvergetojn², kiujn poste oni kurbigis rondforme kaj ĵetis ilin en riveron Jantra por sano. Avertitaj anticipe, ni eliris el la urbo kun rondforme kurbigitaj salikvergetoj, kiujn ni tenis en la maldekstraj manoj. Sur la tuta vojo ekde la urbocentro ĝis Carevec ĉe ĉiu angulo staris postene lernanto kun tia salikvergeto kaj indikis la direkton, laŭ kiu ni devis iri. La tutantagon ni pasigis en la loko „Ksilifor“. Kiom da personoj kolektiĝis, mi ne rememoras, sed la knabinoj estis nur du — mi kaj Anka Vasileva. Mirinda estis la strebo de ĉiuj knaboj kondukti tiel, ke ni ne sentu nin maloportune. Gajni la konfidon de la homoj per sia persona konduto kaj ekzemplo — tio ĉi estis parto de la neskribita statuto de RMS.

Ĉu ni legis ion nelegalan, mi ne memoras. La komuna manĝotablo estis zorgeme aranĝita de la knabinoj. Antaŭ ol ni komencis manĝi eksonis nekutima komando: „Por preĝo ekstaru!“ Ni ekstaris. Ivan Raĉev deklamis „Mian preĝon“ de Ĥristo Botev³. Tiaj momentoj estis organizataj zorgeme kaj per junula inventemo. Poste Nedjalko Gacov deklamis „Batalon“, ankaŭ de Botev, sed sen la efiko de „Mia preĝo“.

Botju Penev ne povis veni kun ni je la deka. Li devis esti en la restoracio tagmeze kaj poste veni. Bedaŭrinde, li serĉis nin sensukcese tutan posttagmezon. Ni renkontiĝis kun li apenaŭ la vesperon. Botju ankaŭ estis kun la violono, iomete konfuzita pro la malsukceso trafi nin.

² En Bulgario, kie ne kreskas palmoj, je Palmodimanĉo anstataŭ palmaĵoj foliojn la preĝantoj portis salikvergetojn, tial la tago mem nomiĝis Salikdimanĉo.

³ Ĥristo Botev (1848—1876) — genia bulgara poeto, revoluciulo, gvidanto kaj ideologo de la bulgara nacilibera movado kontraŭ la otomana jugo. Li pereis en 1876 j. en batalo kontraŭ la turkoj kiel komandanto de taĉmento. La versaĵo „Mia preĝo“ esprimas la kredon de Botev.

¹ RMS — *Rabotniĉeski Mladeŝki Sâjuz* (Laborista Junulara Unuiĝo) — eksterleĝa junkomunista organizaĵo.



Ci-jare la jarkunvenoj de la E-societoj en nia lando pasis sufiĉe sukcese. Gratulinda estas ties bona vizito, la vigla kaj sencohava diskutado, la promesplenaj decidoj kaj rekomendoj pri la estonta agado. En multaj lokoj la aŭtoritataj instancoj montris atenton al la kunvenoj. Ekzemple en u. Gâlâbovo, distikto Stara Zagora, la jarkunvenon de la loka E-societo „Kolombo de la Paco“ ĉeestis la sekretario de UK de BKP kaj la prezidanto de UK de Patrolanda Fronto, kiuj diris salutvortojn. E-societo „Progreso“ en uzi-
no „Madara“, u. Ŝumen, ĝuas la subtenon de la uzina gvidantaro. La kunvenon de E-societo „Suno“ en u. Vârbica, distrikto Ŝumen, salutis la prezidanto de la Urba Popola Soveto. Deko da ĵurnaloj informis pri la jarkunvenoj de diversaj E-societoj kiel pri notinda socia aranĝo.

La jarraportoj konigis sukcesojn sur diversaj kampoj de la enlanda E-movado — kursoj, prelegoj, kulturaj kaj belartaj aranĝoj, veturoj eksterlanden, akcepto de eksterlandaj gastoj, aktivecoj sur la kampo de ĝemeliĝintaj urboj, porpaca aktiveco, fir-

maj kontaktoj kun neesperantistaj organizaĵoj, agnosko kaj subteno fare de ŝtataj instancoj, publikigo de priesperantaj materialoj en la neesperantista gazetaro kaj la radio ktp.

La kerno de la atingoj baziĝas sur la fortostreĉa kolektiva agado de la societaj aktivularoj, sur la bone faritaj agadplanoj kaj la strikta kontrolo pri ties realigo. Aparte laŭdindaj tiurilate estas jenaj societoj: „Verda Eskadrono“ — Târgoviște, „Kulturo“ — Plovdiv, „Maksim Gorkij“ — Sofia, „Fervojista Impeto“ — Gorna Orjaĥovica, „Eterna Amikeco“ — Pleven, „Albatroso“ — Varna, „Radio“ — Pazarĝik, „Progreso“ — Kubrat, „Heroldo“ — Sofia ka.

La nombro de la societa membraro sendube estas atesto pri bona agado. La persistaj klopodoj dum la kongresa 1976 j. kroniĝis per bona sukceso: la membraro de BEA superis la ciferon 6000. Plej granda kresko de la membraro montris u. Varna kaj ĝia distrikto (524 membroj en 1976 kontraŭ 112 en 1975!). Tie fondiĝis 10 novaj societoj, la membraro de la urba s-to „Albatroso“ preskaŭ triobliĝis (180 kontraŭ 70). DE de BEA en

La dua ekskurso okazis en la loko „Zelenska“. Ni estis avertitaj de Botju, ke de ni dependas, ke ĉiuj gaju kaj denove ekdeziru veni kun ni. Tio ĉi signifis, ke la kerno de la ekskursantoj estas organizitaj RMS-anoj, kaj ili respondecas pri ĉio. Ĉirkaŭ tiu ĉi kerno estis simpatiantoj, je kiuj ni povis kalkuli. Krome tamen estis multaj aliaj, kiuj simple venis por promeni. Tiun ĉi tagon Botju Penev estis la animo de la ekskurso. Li estis persvadinta kaj veniginta kun ni du instruistojn, kies ĉeesto tute legaligis la ekskurson. Tio ĉi estis la instraistino de psikologio kaj latino Denikova kaj la instruisto de fiziko Băčvarov, esperantisto. Ni alvenis en malgrandaj grupoj al la konsentita loko — vasta herbejo kun fontano kaj ombroj. Ludoj kaj krioj, ridoj kaj konversacioj sonis la tutan tagon. Ĉiu trovis novajn amikojn, kamaradojn. Botju kaj la instruistino Denikova preparis por ĉiuj glaciaĵon el lakto, fragoj kaj konjako.

La produktoj por tio estis alportitaj el la urbo. La preparado de glaciaĵo fariĝis tuta rito. Sekvis la plej grava parto: arta programo kaj komuna amuzado. Por tio ĉi ankaŭ estis destinitaj homoj. La programo devis esti varia kaj riĉenhava. Ĝi devis efiki, entuziasmigi kaj orienti la junajn homojn al serĉado de la vero en la vivo. Tiuj programoj estis nia baza efikrimedo. Kiu deklamis kaj kion oni deklamis, mi ĝuste ne rememoras, sed nia ĉefa repertuaro konsistis el poeziaĵoj de Ĥristo Smirnenski⁴. Dum tiu ĉi ekskurso okazis incidento, kiun mi bone memoras, ĉar ĝi kaŭzis aflikton al la instruistoj kaj metis Botju-n en malfacilan situacion. Ĉe la plenumo de la programo ĉio estis farata tiel,

⁴ Ĥristo Smirnenskij (1898—1923) — granda proleta poeto. Lia poezio inspiris la progresman bulgaran junularon al batalo kontraŭ la kapitalismo kaj faŝismo.

Smoljan konsiderinde plimultigis la nombron de la membroj (777 kontraŭ 618 en 1975), el ĝiaj 15 societoj eĉ ne unu malpliigis la membraron. Menciinda membrarkresko montris ankaŭ la distriktoj Ruse (499 kontraŭ 458), Plovdiv (200 kontraŭ 173), Razgrad (137 kontraŭ 110) ktp.

Sed la rezultoj sur ĉi kampo povus esti multe pli grandaj, se kelkaj distriktaj kaj s-tiaj estraroj ne neglektis tiun gravan sektoron de nia agado. Oni rajte povas riproĉi la distriktajn estrarojn en Ĥaskovo, Vraca, Tolbuhin, Jambol, Vidin, Miĥajlovgrad, Kargali, Silistra ka., la estrarojn de la societoj „Stelo“ — u. Kargali, „Marek“ — Stanke Dimitrov, „Ondo“ — Ajtos, „Mondpaco“ — Karnobat, „Prospero“ — v. Dâskot, distrikto Veliko Tarnovo, ka.

La strikta asocia dis plino rilate al la memrokotizado validas por ĉiuj estraroj, por ĉiu aparta esperantisto. Por montri estimon al la bone agantaj societoj sur tiu kampo la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ ekde tiu ĉi numero enkondukas la rubrikon „Laŭdinde“. En ĝi staros la nomoj de tiuj societoj, kiuj plimultigis sian membraron kompare kun la pasinta 1976 j. En ĝi jam okupis honoran lokon 15 societoj. Ili ĉiuj agis bone, sed tri

meritas apartan mencion. E-societo „Kolombo de la Paco“ en u. Gâlâbovo jam en januaro raportis pri kolekto de la membrokotizo de 80 membroj (kontraŭ 70 en 1976). La tertremo en marto grave trafis urbon Svištov. Pereis homoj, inter kiuj ankaŭ esperantistoj. La atenton de la loĝantaro entute direktiĝis al riparo de la difektitaj konstruaĵoj. Tamen la estraro de la urba E-societo „Danuba Stelo“ persistis sur sia posteno kaj sukcesis plialtigi la societan membraron (60 membroj kontraŭ 55 en 1976). Ĉu ne admirinda kaj gratulinda aktiveco?

Ni atentigas kaj demandas: ĉu necesas sur la paĝoj de „Bulgara Esperantisto“ aperigi ekzemple angulon por riproĉado „Nigra Tabulo“ — por societoj, kies estraroj kaj membroj malakuratas?

Dum la kuranta jaro, tiel ankaŭ dum la venonta, lige kun la du grandaj eventoj — la 63-a UK de Esperanto en Varna kaj la 34-a kongreso de TEJO en Veliko Tarnovo — la taskoj de la bulgaraj esperantistoj kreskos pli kaj pli. Certa premiso de la sukcesoj estas la modela organiza disciplino. Eĉ ne unu membro rompu ĝin!

Kr. KARUCIN

organiza sekretario de BEA

ke la homoj sentu nenian organizaĵon. Tial o anoncadis, ke la interpretoj okazas laŭdezure. Tiutempe oni tre ŝatis reciti unu senpretendan versaĵon, kiu ĉiam vekis entuziasmon ĉe ni. La versaĵo rakontis, kiel Lenin organizis strikon en la paradizo, dank' al kiu dio estis devigita akcepti okhoran labortagon tie. Ĉi versaĵon oni recitis en intima rondo, sed iu kamarado ekstaris por deklami ĝin nun. La instruistoj levis manon, kio signifis malpermeson. La kamarado estis ĉesigita, Botju konfuzite devis klarigi, ke tio ĉi estas propravola manifestiĝo.

De tiu ekskurso restis ĉe mi ankaŭ rememoro pri la kantoj kaj la muziko. Botju ekludis per la violono kaj komenciĝis viglaj rondodancoj, kiujn ĉiuj partoprenis. Ĉi-foje tamen ekbrilis nova stelo — iu junulo, kies nomo, laŭ mia memoro, estis Paunov. Li majstre ludis akordionon kaj kantis.

Ni revenis jam vespere. Nia lasta progra-

mero estis viciĝo en kolonoj kaj eniro en la urbon kun la E-himno. La kantado daŭris ĝis la monumento, kie oni senpaŭze ripetis la himnon kelkfoje.

Botju organizis ankoraŭ unu ekskurson, same tiel amasan, kaj denove invitis instruistojn. Ĉi-foje la ekskurso okazis en loko sude de Veliko Tarnovo. Amasĝis multaj homoj. Novaĵo ĉe la amuzo estis la lulilo. Al iu venis la ideo kunporti ŝnuron kaj ĉar tie ĉi estis grandaj kaj taŭgaj arboj, ni faris lulilon.

En unio mi vidis lastfoje Botju-n. Li jam estis diplomiĝinta. La tiam li iris mili'servi. Kiam oni arestis lin, venis ordono, ke ĉiu, kiu havas liajn fotojn, leterojn, librojn, kaŝu aŭ nenigu ilin. E' tiu tempo mi havis multe da fotoj, sed konserviĝis nur unu: sur ĝi klare vidiĝas Botju en la mezo kun la violono.

Ivanka Vangelova



LAŬDINDE!

Ekde tiu ĉi numero ni komencas publiki sinsekve la nomojn de E-societoj, kiuj en 1977 j. varbis pli da membroj ol en 1976 j.

Ĉiu societo povas trovi lokon en tiu ĉi honora rubriko. Ĝi nur volu! La ciferoj en krampoj rilatas al 1976 j. La ordo — alfabeto laŭ distriktoj.

Jakoruda — E-societo „Paco“ — 16(12)

Svištov — „Danuba Stelo“ — 60(55)

Drjanovo — „Ivan Vladkov“ — 59(53)

Peŝtera — „Nova Epoko“ — 32(31)

Pleven — „Mondpaco“, fervojista — 20(19)

Plovdiv — „Espero“, fervojista — 26(10)

Plovdiv — „Studenta Impeto“ — 23(12)

Kubrat — „Progreso“ — 70(65)

Zlatica — „Verda Lumo“ — 30(18)

Samokov — „Rila Esperantisto“ — 50(45)

Stara Zagora — „Verda Stelo“ — 70(60)

Gâlâbovo — „Kolombo de la Paco“ — 8(70)

Ŝumen — „Progreso“, uzina — 52(26)

Vârbica — „Stino“ — 20(16).

ORGANIZA VIVO

SOLENE FINITAJ E-KURSOJ

Gâlâbovo. La vesperon de la 21 de majo estis organizita abiturienta balo por la novaj esperantistoj, kiuj ĵus finis la E-kurson por komencantoj ĉe E-societo „Kolombo de la Paco“ sub la gvido de la entuziasma kursgvidanto Kanjo Kanev. La balo okazis en restoracio „Mevo“ en pitoreska loko ĉe la lago de elektrocentralo „Unua Komso-mola“.

Sur la tabloj bonodoris rozbukedoj. Ankaŭ la abiturientinoj en siaj longaj diverskoloraj roboj aspektis kiel rozoj. Karaj gastoj estis k-do Ivan Deĉev — vicprezidanto de DE de BEA en Stara Zagora, Neli Cankova — E-instruistino el v. Enina, Penju Kartalev — frunte de grupo el E-societo „Trakia Lumo“ — u. Marica.

Plej bone en la kurso laboris Radi Ĵeljazkov, Ruska Dimova, Ĵivka Petrova, d-ro Nedko Gajdarov. La kursgvidanto k-do Kanjo Kanev — prezidanto de la E-societo, disdonis la atestojn. K-do Ivan Deĉev enmanigis donacojn al la distingitoj. Poste li en la nomo de CE de BEA dekoris la bruston de nia altestimata E-veterano Boris Kostov per la ora insigno de BEA. K-do Kostov respondis per belaj E-kantoj.

Post la oficialaj momentoj komenciĝis dancoj, kantado, ŝercoj, amuzado ĝis mateniĝo.

Goĉo Koev

Trojan. Solene finiĝis E-kurso por komencantoj sub la gvido de Ivan Liŝev. Por la kunveno en la Domo de Sindikatoj kolektiĝis pli ol 70 geesperantistoj kaj gastoj. Ĉeestis ankaŭ la jam pli ol 80-jara E-veterano Minko Conkovski, patro de la pereinta en la kontraŭfaŝisma batalo Ĥristo Conkovski.

La gekursanoj — pli ol la duono el ili kun supera instruisteco — prezentis belartan programon. La kursgvidanto enmanigis la atestojn kaj al la plej bonaj ankaŭ memordonacojn.

Ĉiuj novaj geesperantistoj deziras partopreni diversajn E-aranĝojn en la somero por perfektigi sin plue en la lingvo: en Burgas kaj Velingrad (Bulgario), en Mjendziguĵe kaj Mielno-Koŝalin (Pollando).

La solenaĵo finiĝis per komuna vespermanĝo, dancoj, amuzado.

Marin Kisjov



INTERDISTRIKTA E-RENKONTIĜO EN STARA ZAGORA

Honore al la 60-jara jubileo de la Granda Oktobra Revolucio kaj la 100-jariĝo de la bulgara libero la 15-an de majo en Stara Zagora okazis renkontiĝo de esperantistoj el Plovdiv, Jambol kaj Stara Zagora. La dommastroj montris gastamon atendante la alilokajn samideanojn ĉe la fervoj- kaj aŭtobusstacio.

Post la kolektiĝo en la klubejo de E-societo „Verda Stelo“ sur bul. „Ruski“ la tuta esperantistaro vizitis la belan novan konstruaĵon de la opero kaj la pitoreskan parkon „Ajazmo“. Antaŭ la turista domo, inter buntaj floroj kaj sub la kronoj de jarcentaj arboj la Renkontiĝo estis oficiale malfermita de Neĵko Kunev — prezidanto de la junulara sekcio de „Verda Stelo“. Slavi Janulov, sekretario de la societo, rakontis skize pri la historio kaj la nuna stato de Stara Zagora, pri la disvolviĝo de la E-movado en la urbo. Sekvis belarta programo. Toma Aĵolov el Plovdiv recitis siajn versaĵojn en Esperanto. La operkantistino Rene Jordanova el Stara Zagora, laŭreato de Dimitrov-premio, plenumis „Ne ploru, panjo“ de Ĥr. Botev kaj popolkanton. Atanas Ŝopov el Plovdiv gajigis la publikon per anekdotoj.

Posttagmeze la esperantistoj vizitis la urban historian muzeon, la Azotsterkan Uzino apud la urbo ka.

Okazis utila dialogo inter reprezentantoj de la E-estramoj el la tri distriktoj. Estis planitaj kelkaj komunaj entreprenoj. Ĉiuj esperantistoj esprimis grandan kontenton pri la Renkontiĝo, en kiu ili interŝanĝis spertojn kaj ideojn pri sia estinta E-laboro.

Dimo Trudoljubov

GRANDA E-RENKONTIĜO APUD RILA

Ĉi-jare la tradicia renkontiĝo de la esperantistoj el suda kaj sud-okcidenta Bulgario okazis en la piedoj de la majesta Rila-montaro, apud v. Mala Ĉarkva, je 14 km de urbo Samokov. Partoprenis 250 geesp-toj el la distriktoj Sofio, Pazarĝik, Plovdiv, Stara Zagora, Kjustendil, Blagoevgrad, Vraca.

Centra momento de la renkontiĝo estis la vespero en la ripozdomo apud v. Mala Ĉarkva. Pri la renkontiĝo de la packonstruantoj en Varsovio kaj pri la partopreno de la bulgaraj esp-toj en la batalo por paco parolis la prezidanto de MEM k-do Nikola Aleksiev. La ĉeestantoj aprobis la tekston de telegramo al la Internacia Komitato de MEM, en kiu ili esprimas sian solidarecon kun la batalo de la progresemaj fortoj en la mondo por amikeco kaj kunlaboro inter la popoloj kaj pretecon per ĉiuj fortoj subteni tiun grandan batalon.


Sekvis belarta programo el recitaĵoj, humuraĵoj, kantoj en Esperanto kaj en bulgara. Apartan plezuron havigis al ĉiuj la riĉa programo de la turista kanthoro de Samokov.

Post la programo sekvis komuna vespermanĝo dancoj kaj amuzado.

La sekvan tagon kelkdekoj da partoprenantoj en la renkontiĝo ekskursis aŭtobuse al la montopinto Maljovica, kaj la ceteraj pasigis la tempon en amikaj interparoloj, kantado kaj promenadoj tra la ĉarma regiono kun petola, kristale pura rivereto kaj majesta konifera arbaro.

ZO

BRILA SUKCESO DE ESPERANTO EN LA ĈEFURBO DE LA RIDO



La industria urbo Gabrovo, delonge konata pro la ekonomia entreprenemo kaj gaja humuro de sia loĝantaro, jam akiris novan famon: dum la lasta jardeko ĝi transformiĝis en ĉefurbon de la rido. Ĉi tie estis kreita konstante funkcia Domo de la Humuro

kaj la Satiro — tuta komplekso de ekspoziciaj salonoj, kie estas kolektitaj humuraj kaj satiraj verkoj el la tuta mondo. En majo ĉiun malparan jaron en Gabrovo okazas Festivalo de la Humuro kaj la Satiro. Ĝi pasas sub la devizo: „La mondo ĝisvivis, ĉar ĝi ridis“.

Ĉi-jare la Festivalo de la Humuro kaj la Satiro okazis de la 21 ĝis la 29 de majo. En ĝia programo estis:

karnavala procesio — ĝin partoprenis reprezentaj kolektivoj el 10 distriktoj de nia lando;

III internacia ekspozicio de la karikaturo kaj la malgranda plastiko — en ĝi partoprenis 489 aŭtoroj el 48 landoj per 626 verkoj;

I ekspozicio de la humuro kaj la satiro en la pentroarto — en ĝi partoprenis 12 landoj per 131 bildoj;



ekspozicio de maskoj — 150 el 17 landoj;
fotorido — tiun ekspozicion partoprenis
358 fotistoj el 21 landoj per 1311 verkoj;
nacia ekspozicio de la bulgara karikaturisto;
tri memstaraj ekspozicioj de karikaturoj —
Ivan Semjonov (UŜSR), Asen Grozev kaj Georgi Ĉapkânov (Bulgario);

renkontiĝo de popolaj sprituloj — pli ol
20 personoj el la lando;

ĉiuvespere en diversaj salonoj humuraj
spektakloj de profesiaj teatroj kaj amatoraj
artkolektivoj el la lando.

Aparte grava aranĝo por ni, la esperantistoj, estis la oficiale enprogramita esperantlingva spektaklo: la 28-an de majo en la salono de la kulturdomo en kv. „Ljubovo“ estis prezentita la komedio „La ruĝaj rozoj“ de la itala aŭtoro Aldo de Benedetti. Rolis la konataj geaktoroj el la Bulgara Eesperanta Teatro Belka Beleva, Olga Popova, Anani Anev kaj Mihail Ĉobanov.

Malgraŭ la malbona vetero (preskaŭ tuta pluvo) la salono estis plena de esperantistoj el la distriktoj Gabrovo, Stara Za-

gora, Pleven, Veliko Târnovo ka. El Sofio estis veninta grupo el 35 esperantistoj.

Antaŭ la komenciĝo de la spektaklo mallonge parolis k-do Kunĉo Vôlev, sekretario de BEA, kiu substrekiis la gravecon de tiu unikaĵo kiel altan rekonon de Esperanto kaj esprimis la komunan ĝojon pro la sukceso. Dankante la iniciatinton — la Distriktan Estraron de BEA en Gabrovo kaj unualoke ties prezidanton k-do Neno Janev, li esprimis la esperon, ke la spektaklo estas nur bona komenco, sekvenda.

La artistoj ludis brile. Ilia parolo estis korekta, la prononcado — senriproĉa. La figuroj, kiujn ili pentris sur la scenejo, restos por ĉiam en la memoro de la entuziasmigita publiko. Ŝtormaj aplaŭdoj kaj multege da floroj estis la esprimo de ĝia sincera ĝojo kaj kontento.

Do, ankaŭ la esperantistoj aldonis sian ridon al la optimisma, vivĝoja kaj vivaprobarido, per kiu nia libera popolo adiaŭas sian pasinton kaj konstruas novan, feliĉan vivon por ĉiuj.

L. St.

NEFORGESEBLA EKSKURSO

La 24—25-an de majo la Sofia Instruista E-Societo „Diĉo Petrov“ organizis kune kun la Centra Domo de la Instruistoj 40-personan aŭtobusan ekskurson al Rodopi-montaro.

La unua objekto sur nia vojo estis Asenova Krepost (Fortikaĵo de Asen) apud Asenovgrad el la XIII jc. Sekvis Baĉkovo—monaĥejo (XI jc), kie ni tagmanĝis kaj ripozis. La bela asfaltita vojo kondukis nin pluen — supren kaj supren, prefer rivero Ĉaja, kaj post malpli ol unu horo ni atingis la monumenton de nia societa patrono Diĉo Petrov, starantan fiere maldekstre de la vojo. Pri la vivo kaj batalo de la fidela kaj brava popola filo kaj arda esperantisto Diĉo Petrov parolis mallonge la prezidanto de la Societo Kunĉo Vôlev. Ni metis grandan florkronon antaŭ la monumenton de la glora antifaŝisto, pereinta en la batalo kontraŭ la monarko-faŝismo kaj kapitalismo la 23-an de majo 1944 — nur tri monatojn antaŭ la fina venko de la popolo.

Ni vizitis ankaŭ la naskiĝvilaĝon de Diĉo — Progled, situantan nur 300 m dekstre de la vojo. Ĉi tie ni trafis lian onklon, kiu rakontis al ni interesajn momentojn el la vivo de Diĉo.

Post tio ni havis la plezuron viziti ankaŭ la ĉarman ripozlokon Pamporovo — vera juvelo de nia bela patrolando, alloga kaj ŝatata de ĉiuj turistoj — bulgaraj kaj eksterlandaj, kun idealaj kondiĉoj por ripozo kaj kuracado en la pitoreska konifera Rodopi-montaro.

Jam mallumiĝis, kiam nia aŭtobuso atingis Pisanica-n — vilaĝo je 6 km de u. Smoljan,

kie jam kelkajn jarojn funkcias Internaciaj E-Kursoj, organizataj de la entreprenema Distrikta Estraro de BEA en Smoljan. Nin renkontis la prezidanto de DK k-do Jordan Jordanov kaj kelkaj aliaj aktivuloj. Okazis komuna vespermanĝo kaj sincera improvizita amuzprogramo.

La matenon ĉiuj ekskursantoj estis ravitaj de la impona, nun konstruata Esperantodomo, fiere staranta en la korto. Ĝi jam atin-



gis la kvinan etaĝon. En la domo estos lerno- kaj dormoĉambroj por pli ol 200 personoj, instrukabinetoj, salono por ĝeneralaj kunvenoj, biblioteko, manĝejo ktp—ĉio necesa por altnivela moderna instruado de Esperanto. Ni grimpis sur la kvinan etaĝon. La ĉarma panoramo, kiu etendiĝis antaŭ la okuloj, ravis ĉiujn. Multaj gesamideanoj kortuŝite konfesis: „Ni vere estas feliĉaj vidi nian propran esperantistan domon. . . Tio estas vera palaco de Esperanto! . . . Dankon al niaj fervoraj samideanoj el Smoljan-distrikto! Ilia laboro estas modelo ne nur por ni, tamen ankaŭ por la E-movado en la tuta mondo!“

Tiu unikaĵo estos inaŭgurita tuj post la 63a UK de Esperanto en 1978. Kredeble, la prezidanto de UEA persone malfermos ĝin en la ĉeesto de centoj da esperantistoj el diversaj landoj, kiuj poste povus resti

ripoze tie almenaŭ semajnon.

Post matenmanĝo nia grupo direktiĝis al la proksima bela urbo Smoljan. Ĉi tie ni kun granda intereso vizitis du objektojn — la riĉan etnografian muzeon kaj la modernan planetarion.

Komenciĝis nia reveno, ĉi-foje laŭ tute alia vojo: tra Ŝiroka Lâka, Dospat (preter ĝia majesta kaj belega barajlago), preter la barajlagoj „Vasil Kolarov“ kaj „Batak“. Nelongedaŭra halto en u. Batak. Ĉi tie ni vizitis la novan historian muzeon kaj la faman preĝejon, kie dum la tagoj de la Aprila Ribelo de la bulgara popolo en 1876 j. okazis la kruelega masakro de kelkcentoj da loĝantoj, inter kiuj ankaŭ infanoj kaj eĉ beboj, fare de la turkoj.

Malfrue vespere ni revenis Sofion. En nia memoro restos neforviŝebla tiu ĉi riĉega je impresoj kaj travivaĵoj ekskurso.

Kovo

TRA LA E★ MONDO

Esperanto-renkontiĝo en Permĵ

Je la 7—9a de marto en u. Permĵ (USSR) okazis renkontiĝo de 106 esperantistoj el 17 urboj. Permĵanoj varme akceptis la gastojn kaj la renkontiĝo estis tre sukcesa.

Dum la konferenco enkadre de la renkontiĝo reprezentantoj de diversaj E-klubo raportis pri sia kluba agado. Ĉiuj esperantistoj partoprenis mitingon por defendo de la paco kaj amikeco inter la popoloj. Ili alvokis la tutmondan junularon, ĉiujn honestajn esperantistojn unuigi sin por pacdefendo, por lukto kontraŭ la militbruliga imperiismo.

Dum ekskurso permĵanoj montris al la gastoj sian belan urbon. Oni vizitis ankaŭ operon kaj baleton, bildgalerion kaj muzeon.

Vladimir Izosimov

E-renkontiĝo en Kazahio

La 7—9-an de majo en pitoreska arbarloko apud urbo Ust-Kamenogorsk (Kazahio, USSR) okazis la tradicia printempa renkontiĝo de esperantista junularo. Partoprenis dudek du anoj el la E-klubo de Barnaul, Ŝemonajha kaj Ust-Kamenogorsk.

Dum tri tagoj la E-flago gaje flirtis super la tendareto en verdpina montaro, dum tri tagoj la junuloj ĝuis enhavoriĉan programon

zorge preparitan de la dommastroj — la anoj de la junulara E-klubo „Verda Horizonte“ en Ust-Kamenogorsk. Post kunsidoj de la aktivuloj sekvis ardaĵ sportkonkuroj kaj turistaj stafetoj kun multnombraj baroj. Post marŝoj tra la montaro oni kun plezuro ŝovis sin en glaciakvan Ulbinka-rivereton, sunbruniĝadis. Okazis ankaŭ konkursoj de tradukemuloj kaj interpretistoj. Ĉiuvespere la tradician lignofajron kronis E-kanzonoj sub gitara akompano, ŝercoj kaj anekdotoj.

Post tri ravaj ragoj la gastoj kaj la mastroj revenis la urbon por disiĝi. . . ĝis la sekva simila aranĝo. Ĝis revido, karaj geamikoj!

Boris Anohin

KUNLABORU KUN KULTURKLERIGAJ DOMOJ EL SOVETUNIO!

Ĉi-sube ni aperigas la tekston de letero de k-do Stepan Konstantinoviĉ Ĥvorostin (190 00 Leningrad, str. Svja 71, dom 20/24), kiun ni prenas el „der esperantist“ n-ro 5/1976. La letero entenas proponon pri kunlaboro inter kulturklerigaj domoj, certe grava por niaj landoj. Interesuloj sin turnu rekte al k-do Ĥvorostin. Jen eltiro el lia letero:

„Por la Palaco de la Kulturo, kiu donas al la Leningrada Esperanto-Klubo ĉambron, estas interesaj informoj pri la karaktero, organizo kaj laboro de domoj de kulturo kaj similaj kluboj (ĝenerale, ne nur por unu specialeco), kiuj ekzistas en aliaj socialismaj landoj. Se en via urbo aŭ en proksima regiono ekzistas tiuj ĝeneralaj kulturklerigaj domoj, palacoj aŭ kluboj, bonv olu:



1. ricevi de ili materialojn pri iliaj strukturo, taskoj, problemoj, interesaj aranĝoj kaj pri ilia laboro;

2. traduki tiajn materialojn en Esperanton kaj sendi la tradukitajn tekstojn kun (se riceveble) fotoj, anoncoj, programoj, prospektoj. Faru tion, kvankam la materialoj estas nacilingvaj (kun Esperanta traduko)! Por ne tro ĝeni vin per mia peto, mi povus ricevadi la materialojn iom post iom.

La kolekto de tiuj materialoj helpas al nia Esperanto-klubo, ĉar la estraro de la Palaco de Kulturo „Kirov“ post tio estus pli favora al la Esperanta laboro. Post la ricevo de la materialo pri eksterlandaj kulturdomoj, palacoj, kluboj vi ricevos samajn materialojn pri la laboro de nia Palaco de Kulturo, esperantigos ilin kaj sendos ilin kiel respondojn al viaj domoj, palacoj ktp. Interŝanĝo de materialoj konvinkus la administraciojn de ambaŭ domoj pri la utilo de Esperanto en ilia kleriga, kultura kaj politika laboroj.“

UNIVERSITATA AGADO

Grandaj meritoj pri la revigliĝo de la E-movado en Rumanio

Laŭ la instigo de d-ro Ignat Bociort (Boĉort), universitata profesoro, dum la lastaj jaroj Esperanto komencis penetri en la universitatajn kaj sciencajn mediojn de Rumanio. Notindaj estas interalie jenaj rezultoj.

En la Universitato de Timiŝoara — kie li estas profesoro pri literatura teorio — d-ro I. Bociort prelegis la 6-an de aprilo 1977 pri „La nuntempa scienco kaj la ideo pri nova lingva ordo en la mondo“. La prelegon, okazintan en la granda aŭditorio, ĉeestis grandnombra universitata publiko. Sekvis viglaj diskutoj. Tio estis la tria manifestiĝo en tiu ĉi universitata jaro. La aliaj du estis: la aranĝo, en granda halo de la Universitato, de la ekspozicio „Esperanto en teorio kaj praktiko“, kiu ĝuis grandan intereson, kaj la prezento en la simpozio, organizita okaze de la jubilea jaro de la Universitato, de kvar sciencaj komunikaĵoj pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj temoj.

En alia universitato — tiu de Bukureŝto — fondiĝis Esperantologia Rondo, gvidata de Iona Prioteasa kaj Constantin Dominte, universitataj asistantoj pri lingvistiko. Kiel unua agadpaŝo malfermiĝis Esperanto-kurso, gvidata de C. Dominte. Estas ankaŭ notinde, ke I. Prioteasa estas la aŭtorino de la ĉapitro pri la artefaritaj lingvoj en „Tratat de lingvistika generala“ (eldonita de la Akademio), en kiu diference de aliaj antaŭaj eldonoj, Esperanto estas favore traktata.

Aurel Boia

El «Esperanto», 5/1977

ESPERANTO-NOVAĴO EL LATVIO

La plej grava kulturrevuo de Latvia SSR „Karogs“ („Standardo“) — eldonkvanto 35 000) organo de la Asocio de Latviaj Sovetaj Verkistoj, publikigis du informartikolojn de latva poeto kaj esperantisto Harijs Skuja.

La unua artikolo koncize informis pri la eldona aktiveco de la estona libroeldonejo „Eesti Raamat“ — plurfoja aperigo de Esperantlingvaj turistaj broŝuroj pri Estonio. Precipe atentinda estis tiu fakto, ke estonaj samideanoj bone aplikas Esperanton por popularigo de sia nacia literaturo kaj kulturo eksterlande. Oni menciis la jam aperigitajn librojn: la estona nacia eposo „Kalevipoeg“ en bonega traduko de Hilda Dresen, „Kusanta tigro“ de L. Promet, „Okupacio“ de E. Krusten, la ĵus aperinta romano „La mastro de Kôrboja“ de la estona klasikulo A. H. Tamsaare, la kolekto „Estonia soveta poezio“.

La dua artikolo sub titolo „En Esperanto“ konigas al la neesperantista leganto la kulturolon de la lingvo internacia. La aŭtoro de tiu artikolo skize rakontas pri la faritaj tradukoj en Esperanton notante, ke jam multaj ĉefverkoj — klasikaĵoj de naciaj literaturoj — estas esperantigitaj kaj tiel atingeblaj por vasta internacia legantaro. Sekvis informoj pri la plej freŝaj tradukoj de Tagore „Malsata ŝtono“ kaj „Bhagavad Gita“, kaj pri la nova libroserio de la Hungara E-Asocio.

T. Bercis

KONCIZE

● Verkinte disertacion pri la angla romanisto kaj dramaturgo Charles Reade kaj defendinte ĝin la 10-an de januaro, Marjorie Boulton doktoriĝis en la Universitato de Oxford la 5-an de marto 1977. D-ino Boulton ricevis helpon ĉe multaj movadaj geamikoj kaj delegitoj de UEA por kolekti informon pri kelka subtemo de la disertacio. Dum la defendo la ekzamenistoj alte aprezis ŝian utiligon de Esperanto tiucele.

● Inter la 13-a kaj 16-a ĉe aprilo 1977, en la Varsovia Universitato okazis la 5-a Studenta Interlingvistika Seminario, kies programo traktis 11 prelegojn.

● La informadon pri la belaĵoj de niaj socialismaj frataj landoj tre lerte kombinas s-ro Werner Haupt kun informado pri Esperanto. Ekde 1959 li 121-foje (!) prelegis pri „Altaj Tatroj“, ekde 1958 j. 89-foje pri Rumanio („Gasto en Rumanio“), ekde 1970 52-foje pri „Bulgario“ kaj ekde 1972 oni 63-foje povis aŭskulti de li la prelegon „Vojaĝo tra 6 landoj“. Liaj prelegoj estis ilustritaj per koloraj diapozitivaj.



Simpozion kun la titolo „Lingvaj baroj kiel monda politika institucio: Kiu komprenigas kion, kiam, kiel“ prezidis estrarano de CED, d-ro Jonathan Pool (Politikscienca Fakultato, Stata Universitato de Nov-Jorkio) ĉi-marte en Saint Louis (Missouri), Usono, ĉe la jarkunveno de la Asocio pri Internaciaj Studoj. La simpozio, kiun aŭspiciis la sekcio pri komparaj interfakaj studoj, konsistis el kvin referaĵoj kaj diskutado.

Komencis la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin (Anglalingva Fakultato, Universitato de Pensilvanio) per „La difinado de lingvo kiel monda problemo: la rolo de neregistaraj organizoj“. Prezintinte lingvajn rajtojn kiel nedisigeblan parton de la rajto je komunikado, Tonkin montris, kiel la principo de nediskriminacia unulingveco faras Universalan Esperanto-Asociation — proporcie al ties rimedoj — multe pli agadkapabla, ol aliaj internaciaj organizoj.

Pri „Lingvaj baroj en Unuiĝintaj Nacioj“ parolis s-ro Ralph L. Harry, aŭstralia ambasadoro en UN. Post tre detala priskribo de la problemoj kaj ties kostoj, emfazante, ke li parolas nur kiel privata persono kaj ne kiel reprezentanto de Aŭstralio, Harry rekomendis kvinjaran programon por la enkonduko de la Internacia Lingvo.

En „La pagodo de Babel“ d-ro David K. Jordan (Antropologia Fakultato, Universitato de Kalifornio), rektoro de ISU en 1972, priskribis la politikajn influojn en Tajvano, Ĉina Popola Respubliko, Japanio kaj aliaj aziaj landoj, kiuj nun efikas disige al la ĉina skriba lingvo, kiu iam estis relative unueca tra la preskaŭ tuta kontinento.

D-ro Richard E. Wood (Fakultato pri Lingvoj kaj Internaciaj Studoj, Universitato Adelphi), redaktoro de „Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado“, atentigis pri la pli interesaj eroj de sia statistika studo „Lingvo-elekto en la internacia radiofonio“.

Pri terminologiaj problemoj en la sociaj sciencoj okupiĝis la referaĵo de Fred. W. Riggs (Universitato de Havajio).

Inter la oficilaj diskutantoj lokon havis ankaŭ d-ro Victor Sadler, direktoro de la Centra Oficejo de UEA. Cetere ĉeestis la konata Esperanto-pedagogo Duncan Charters (Kolegio Principia) kaj la nova konstanta kongresa sekretario de UEA Charles R. L. Power.

Fine de la simpozio d-ro Pool invitis ĉiujn al la Naŭa Tutmonda Sociologia Kongreso (Uppsala, Svedio), kies ampleksan socilingvistikan programon li prizorgas. Interesitaj fakuloj skribu al d-ro Jonathan Pool, Dept. of Political Science, SUNY, Stony Brook NY 11794, Usono.

C. R. L. P.

El «*Esperanto*», 5/1977

Sub tiu titolo aperis rememoroj de prof. d-ro Ljubomir Ognjanov — Rizor en la bulgarlingva unuopa ĵurnalo „Globus“ en 1972 j. La granda amiko de nia popolo, pri kiu skribis la aŭtoro, estas la germana esperantisto-komunisto Otto Bässler (Oto Besler). Lige kun la 80-jariĝo de k-do Bässler ĉi-sube ni donas fragmenton el tiuj rememoroj de L. O.—Rizor.

„En 1928 j. mi legis en revuo „Sennaciulo“ anoncon, ke la estraro de SAT (tiutempe progresema organizaĵo, ekde 1930 j. — kontraŭkomunista kaj kontraŭsoveta) decidis eldonadi stencilitan bultenon, pere de kiu la esperantistaj korespondantoj sciigu al la laborista gazetaro en la tuta mondo novaĵojn el la klasbatalo en sia lando. En la anonco la proletaj ĵurnalistoj-esperantistoj estis invitataj fariĝi libervolaj korespondantoj de la bulteno, nomita simple „Esperanto-servo“, iom poste „Proleta Esperanta Korespondservo“ („PEK-Servo“). Tio estis utila ankaŭ por la redakcioj de nia laborista gazetaro. . . Mi parolis kun la redaktoroj de „Rabotničesko Delo“ Ĥristo Kalajĝiev kaj Enĉo Stajkov kaj kun ilia konsento mi decidis fariĝi korespondanto de la bulteno.

En la anonco oni diris, ke la bulteno aperos en Lajpego, kaj por ĝia gvidanto estis nomita Otto Bässler. Sed kion prezentis tiu homo? Ĉu mi povus kalkuli je li?

La respondo de k-do O. Bässler plene trankviligis min. Li skribis al mi, ke li firme staras sur „katolikaj“ pozicioj kaj ke la tuta bulteno estos „katolika“. Tiu vorto por momento haltigis min, sed mi tuj komprenis, ke sub ĝi kaŝas sin la senco „komunista“! Kaj tiu vorto restis ĝis la fino de nia korespondado. Ekde 1928 ĝis la fino de 1932 j. mi regule, preskaŭ ĉiusemajne, sendis korespondaĵojn pri la marŝo de la klasbatalo en nia lando.

K-do Otto Bässler, preslaboristo, estis gvidanto, redaktoro, organizanto kaj teknika faranto de la bulteno. Por ĝia regula aperado li oferis sian tempon por ripozo vespere kaj en libera tago. La bultenon oni dissendis en centojn da landoj, kaj tiamaniere bulgaraj korespondaĵoj aperis en la tuta mondo. Mi ankoraŭ konservas eltranĉaĵon el proleta ĵurnalo en Argentino. En siaj leteroj Bässler ofte sciigis min pri aperigo de miaj korespondaĵoj en diversaj landoj. Multaj materialoj el la bulteno, tradukitaj de mi, estis aperigataj en la laborista gazetaro. Bedaŭrinde, sub granda parto de ili mankas indiko, ke ili estas tradukitaj el Esperanto-fonto. Dum tiuj 4—5 jaroj (1928—1932) mi regule konservis la tutan bultenon. Mi sukcesis ĝin konservi ankaŭ dum la jaroj de armita kontraŭfaŝisma batalo.



Post la popola venko mi transdonis ĝin bindita al CK de BEA.

Mi konservis ankaŭ ĉiujn leterojn de k-do Bässler al mi. Sed miaj leteroj al Bässler, samkiel la tuta arkivo de PEK-servo en Lajpcigo, estas tute neniigita dum la naziisma reĝimo.

Ĉio ĉi dirita pri la bulteno klare montras, ke Otto Bässler tre aktive helpis la bulgaran laboristan gazetaron en tiu periodo. Li kun aparta amo rilatis al nia lando pro ĝia forta klaskonscia laborista movado. Sendepende de sia laboro ĉirkaŭ la bulteno li kun preteco akceptis transsendi grandan parton el la korespondaĵoj de niaj laboristaj organizaĵoj kun Sovetunio. Multaj libroj, eltranĉaĵoj el ĵurnaloj, leteroj, senditaj de la Tutsovetia Societo por Kulturligoj kun Eksterlando kaj de la Internacia Buroo de la Revolucia Literaturo en Moskvo, de la

Germana Laborista Teatra Asocio en Berlino k. a., al la redakcioj de RLF (Laborista Literatura Fronto), „Balkana Laboristo“, „Pogled“ (Rigardo) en Sofio ka. (aparte en 1929—30 j.) pasis ne nur tra iliaj manoj, sed ankaŭ tra lia tre malplena monujo.

Kelkajn semajnojn antaŭ la veno de la naziistoj PEK estis transportita al Berlino, en la manojn de alia kamarado, sed nelonge post tio ĝi devis ĉesi. Restinte en Lajpcigo O. Bässler estis sendita al koncentrejo. Post la venko super la faŝismo li laboris en entrepreno por disvastigo de la socialisma libro kaj samtempe estis kunlaboranto de la muzeo „Georgi Dimitrov“ en Lajpcigo. Ankaŭ nun, jam pensiulo, li kun amo dediĉas siajn fortojn al firmigo de la amikeco inter GDR kaj NRB kiel eksteretata kunlaboranto de la Muzeo „G. Dimitrov“ kaj la progresema E-movado.

REGULARO

pri aljuĝo de titoloj al Esperanto-instruistoj

1. Konsiderante la grandan bezonon pri Esperanto-instruistoj kaj por stimuli ties multigon kaj metodikan perfektigon, la dediĉon de bonaj esperantistoj al instrua agado, kune kun la materialaj stimuloj la Centra Estraro de BEA estigas ankaŭ spiritajn stimulojn. Por tiu celo ĝi destinas titolojn por personoj dediĉintaj sin al instrua aktiveco kaj atingintaj bonajn rezultojn.

2. Titolon «*Rekonita Lektoro*» oni aljuĝas al Esperanto-instruistoj, kiuj dum pluraj jaroj gvidas regule kursojn kaj manifestiĝis kiel bonaj pedagogoj kaj metodikistoj havantaj tre bonajn rezultojn.

Rimarkigo. Por tiu ĉi titolo ne rajtas kandidati personoj, kiuj ne gvidis almenaŭ dek kursojn.

3. Titolon «*Elstara Lektoro*» oni aljuĝas al multjaraj Esperanto-instruistoj akirintaj famon de bonaj pedagogoj kaj metodikistoj kaj havantaj bonegajn rezultojn, kiuj estigis plurajn Esperanto-aktivulojn kaj partoprenas aktive en la laboro por plibonigo de la organizo de la Esperanta kurssistemo kaj de la instruado mem.

Rimarkigo. Por tiu ĉi alta titolo

ne rajtas kandidati personoj, kiuj ne instruis rezulte Esperanton almenaŭ dek jarojn.

4. La titolojn oni aljuĝas okaze de la naskiĝtago de la iniciatinto de Esperanto D-ro L. L. Zamenhof. Pri tio prenas decidon la estraro de la Instruista Sekcio laŭ proponoj de la distriktaj estraroj de BEA aŭ laŭ propra iniciato. Ĝiajn decidojn konfirmas la Buroo de la Centra Estraro de BEA.

5. La distriktaj estraroj de BEA faras motivitajn proponojn kun detala karakterizo de la kandidato al la estraro de la Instruista Sekcio ĝis la 10-a de oktobro. La estraro de IS prenas decidon kaj transdonas ĝin al la Buroo de la Centra Estraro por konfirmo ĝis la 10-a de novembro.

6. La nomoj de la rekonitaj kaj de la elstaraj lektoroj kun portretoj aperas en la decembra numero de „Bulgara Esperantisto“.

7. Ĉe elekto de lektoroj por centraj, feriaj, societaj k. a. kursoj kaj seminarioj oni preferu Elstarajn kaj Rekonitajn Lektorojn. Ili estu honorariaj laŭ la plej alta tarifo de la koncerna kurso.

Ivan Vazov

LA VOLONTULOJ ĈE ŜIPKA

11 de aŭgusto 1877

Portu ni ankoraŭ la honton torturan,
cikatrojn de l'vipo, de l'sklaveco spuron,
kaj eterne tagoj de nigra malglor'
pendu kiel nubo sur nia memor';
nin rezignu plene tempo, historio,
kaj signifu nia nomo tragedion;
Belasica¹ iam, hodiaŭ Batak²
estu por ni ĉiam plej malhela plag';
estu mokofende montrata la kolo
kun hontaj postsignoj de nia popolo —
heredo de longa subjuga sufer',
kaj estu donaco al ni la liber'.
Estu! Sed ni scias: en estint' proksima
brilas io nova, glorplena, senlima,
pro kio fiere batas nia kor',
per kio ni konas la senton de l'glor';
ĉar jen supre, kie leviĝas la monto
tenanta la volbon ĉe la horizonto,
sin altigas iu pinto al la sun',
kovrita per sango kaj per ostoj, nun
de niasenmorto monument-titano;
ĉar unu memoro estas en Balkano,
estas unu nomo en nia patri',
vivonta eterne en la histori';
nomo el la nomoj plej sanktaj kaj brilaj,
antikva, glorplena kiel Termopiloj,
kiu ĉiun honton forigas de ni
kaj rompas la dentojn de la kalumni'.
Ho, Ŝipka!

Tri tagojn la junaj defendantoj
gardas la pasejon. Arbaroj tremantaj
la bruon batalan ripetas kun ĝem'.
Atakoj teruraj! Dekdufoje jen
la krutajon grimpe la hordoj invadas.
per korpoj ĝin kovras kaj sango fluadas.

¹ Belasica-monto, sur kiu pasas la ŝtatlimo inter Bulgario, Greklando kaj Jugoslavio. En 1014 j. apud ĝi la bizanca armeo disbatis la bulgaran armeon de reĝo Samuil. La imperiestro Vasilius II ordonis, ke oni elpiku la okulojn de la militkaptitoj lasante nur al ĉiuj 100 soldatoj unu vidantan per unu okulo.

² Batak — vilaĝo en Rodopi-montaro (nun urbeto), kies liberama loĝantaro amase partoprenis la Aprilan Ribelon 1876 j. kontraŭ la otomana jugo. Frakasinte la Ribelon la turkoj mortigis laŭ plej kruela maniero ĉ. 3000 loĝantojn. Batak estas simbolo de tragedio de la bulgara popolo.

Ŝtormego post ŝtormo! Ondego post ond'!
Sjulejman³ freneza montras al la mont'
kaj krias: «Ataku! Jen la sklavoj tie!»
La hordoj koleraj releviĝas krie
kaj «alah!» eksplodas tondre tra l'aer';
la supro respondas per »hura!« kaj per
nova pluv' de kugloj, lignopecoj, ŝtonoj;
per sang' niakulitaj la batalionoj
pafas kaj rebatas sen vic', sen komand';
nur antaŭen strebas ĉiu batalant'.
sian morton volas per okuloj vidi,
kaj el malamikoj unu pli likvidi.
Kanonado. Turkoj, krieganta ar',
sturmas kaj pereas antaŭ la rempar';
venas tigre, fuĝas samkiel ŝafaroj
kaj revenas. Gardas leone bulgaroj
la reduton kun la Orlov-regiment'
sen lac' en varmego, soifoturment'.
La sturm' furioza, penega — defend';
tritaga batalo, sed helpo nenia,
ne vidas esperon rigardo ilia,
ne alflugas frataj agloj⁴ por subten'.
Nenio. Pereos ili sur posten'
kiel la spartanoj sub Kserksaj taĉmentoj!
Novan ondon ili renkontas atentaj,
venas la komenco de l'lasta batal'.
Kaj tiam Stoletoŭ, nia general',
ekkriis tondrege: «Junaj volontuloj,
kovru Bulgarian per laŭroj bravulaj!
Al via fortego konfidis la reĝ'
pasejon, militon kaj plie sin mem eĉ.»
Post ĉi vortoj fortaj la viroj tempeste
renkontas la hordojn kriaĉantajn beste
de la malamiko. Ho, heroa hor'!
La ond' frapas rokon, retiras sin for.
Kugloj elĉerpigas, sed la volo estas,
bajonet' rompigas, sed la brusto restas
kaj la dolĉa ĝojo: sur ĉi tiu mont'
fali nun en gloro antaŭ tuta mond'
kaj venki mortante por sia patrio.
«Nun al ni rigardas tuta Bulgario,
ĝi vidos — la supro estas alta tre, —
se ni provus fuĝi. Prefere pere'!»
Armil' plu ne estas, estas hekatombo;
ĉiu ligno — glavo, ĉiu ŝtono — bombo,

³ Sjulejman — ĉefkomandanto de multnombra turka armeo, kiu furioze impetis transpasi la Balkan-montaron kaj helpi la sieĝitan en u. Pleven Osman-paŝao.

⁴ „Frataj agloj“ — t. e. la rusarmeanoj.



ĉiu aĵo — frapo, ĉiu koro — flam'!
 Lignopecoj, ŝtonoj malaperis jam.
 «Ĵetu la kadavrojn!» — ekaŭdiĝis voĉo
 kaj la korpoj mortaj anstataŭ kartoĉoj
 flugas kiel vivaj al la nigra svarm'
 kaj murdas, faligas kiel vera arm'!
 La turkoj ektemas, ĝis nun ne vidintaj,
 tiel kunbatali vivaj kaj mortintaj
 kaj krias demone en sia impet'.
 La morto triumfas. Jam kun bajonet'
 sin ĵetas taĉmentoj niaj, sinoferaj,
 renkontante feron per la brustoj ĵeraj
 kaj antaŭ la morto sen tim', sen kompat'
 kantante sin ĵetas ili en buĉad'. . .
 Sed en novaj ondoj de hordoj sovaĝaj

jam dronas la lastaj soldatoj kuraĝaj.
 Ankoraŭ momento kaj venos la fin'. . .
 Subite Radecki⁵ per sturm' helpis nin. . .

 Ankaŭ nun Balkano memorigas kante,
 dum ventego tiun tagon, resendante
 eĥe ĝian gloron de monto al mont'
 kaj tra la jarcentoj al nia estont'.
Plovdiv, la 6-a de *El la bulgara:*
novembro 1883 *Petro Edrev*

⁵ Generalo F. F. Radecki, kiu venis helpe
 al la defendantoj de Ŝipka-pasejo. Lia taĉ-
 mento konsistis nur el 205 soldatoj raĉdantaj
 po du sur ĉevaloj. Ilia helpo montriĝis decida.

Nikolaj Hajtov

LA KAPRA KORNO*

Ankaŭ tiu ĉi sangoverŝa historio komenciĝas per perforto. Iu Deli Mustafa, kampogardisto en vilaĝo Erkeĉ, eniris la domon de Karaivan en vilaĝo Zagore kaj seksperfortis la konatan pro sia beleco edzinon de Karaivan. La edzo tiutempe estis paŝtanta la kaprojn. Pro timo kaj turmento la sendefenda virino perdis la prudenton, kaj ŝia edzo reveninte trovis ŝin freneziginta. Karaivan surmetis la edzinon sur mulon kaj transportis ŝin en la monaĥejon de Kuklen „Sveti Vraĉove“ (Sanktaj Kuracistoj), por esti kuracata tie ĉe la sankta fonto. La malfeliĉulino baldaŭ mortis kaj estis enterigita tie, apud la Monaĥejo de Kuklen.

Post la entombigo Karaivan, obsedita de malamo kaj malesperiginta, bruligis sian domon en la vilaĝo kaj kun sia dekjara filino Marija iris loĝi en ŝafstalo en la montaro. En tiu ĉi ŝafstalo Marija kaj ŝia malfeliĉigita patro travivis izolate naŭ jarojn. En la vilaĝo Karaivan ne montriĝis, por ke la rememoroj ne gratu la necikatriĝantan vundon. Li ankaŭ evitadis renkontiĝi kun homoj, kaj pro tio ekcirkulis onidiroj, ke li frenezigis, tial neniuj jam kuraĝis

preterpasi liajn ŝafstalojn. La voĵetoj tien kovriĝis de herbo, kaj tiu loko transformiĝis en senhoman sovaĝejon. De tempo al tempo alflugadis de tie sovaĝa ridaĉo kaj blekado de kaproj, kaj el tio oni konkludis, ke ie supre, inter la sovaĝaj rokoj, en la regno de ursoj kaj agloj, Karaivan ankoraŭ vivas.

Ĉiuj forgesis pri Karaivan, kaj neniuj menciis lin eĉ kiam oni trovis Deli Mustafa murdita, kun trapikita brusto. Kaj li estis trapikita ne per jatagano, nek per ponardo, sed per kapra korno. Tiel oni trovis lin — la korno staris en la brusto de la kampogardisto, enigita de diabla mano.

La turkoj ektemis pro ekscito. Ili komencis serĉi la murdinton de Mustafa, sed ne trafis la spurojn. Oni eksciis nur, ke ĉirkaŭ unu semajno antaŭ la morto li trenis iun turkinon en la arbaro kune kun vagabondiĝintaj kiel li kuraĝuloj, kaptis la vinagrovestiston Roksani el urbo Stanimaka kaj metis sur lian kapon ardigitan fajrujan fertripiedon por preni lian monon kaj al iu gvidanto de rikoltistoj forŝtelis la ĉevalon. Sufiĉe da pekoj, por ke troviĝu homo murdi lin.

Ankoraŭ ne sekiĝis la grundo sur la tombo de Deli Mustafa, iu mortpafis per fusilo Kara Memiŝ Derviŝ

* Laŭ tiu ĉi rakonto la Bulgara Kinematografio faris filmon sub la sama titolo.

agaon¹, la spahion² de vilaĝo Kara-gjuzli, en la momento, kiam litrinkis kafon en sia kiosko. La kuglo alflugis el la najbara ulma arbaro, kiam la najtingaloj modulis siajn vesperajn kantojn kaj brufluis la akvo el la tuboj de la ŝtonmasonita fontano, konstruigita de la agao. Ekkuris la filoj kaj la ĉevalbredistoj de Kara Memiŝ, liaj gardistoj kaj kampservistoj, traserĉis la arbaron arbo post arbo, sed la murdinton ne malkaŝis. Kara Memiŝ — la spahio — havis en sia haremo naŭ bulgarinojn, li estis funebriginta multajn patrinojn, multaj viroj havis de li blumakulojn en la ripoj, kaj lia murdinto povis esti ĉiu el liaj tricent vilaĝanoj.

En la tago de la morto de Dipatrino okazis nova sangoverŝo. Neaŭdita kaj nevidita. Sur la vojo al vilaĝo Uzunĝovo, en la loko „Orman Boaz“, oni trovis la policestron de Haskovo-regiono Hjusein kaj kune kun li du famajn pro sia krueleco albanojn. La albanoj estis pafmurditaj kaj Hjusein trapikita per kapra korno. Apud la mortigitoj trankvile paŝtis sin multoj kun du sakoj da ormoneroj el la tempo de sultano Maĥmud la II. Eĉ netuŝitaj per mano. La persekutantoj timtremis, perpleksiĝis kaj ekiris serĉi la rabistojn. Postsignojn ili ne malkaŝis, sed jam estis klare: la mano, kiu sendas al alaho unu post alia la kuraĝulojn, faras tion ne por mono, sed pro venĝo.

La ĉirkaŭaĵo de „Orman Boaz“ estis zorge traserĉita. La persekutantoj atingis eĉ ĝis la ŝafstaloj de Karaivan, sed tie ili trafis nur lin, la frenezulon, kiu kriblis milion — barbiĝinta, kun sangohavaj okuloj. Rimarkinte la turkojn, la frenezulo komencis ridaĉi, kaj ili hastis foriĝi de tiu ĉi malbonaŭgura loko.

Pasis la vintro. La agaoj forgesis iomete la sorton de Deli Mustafa, Kara Memiŝ kaj Hjusein. Sed jen foje du

ĉasistoj el vilaĝo Kozan — Aliŝ kaj Meko — atakis iun virinon. Ne pasis tri tagoj depost tiu ĉi heroaĵo de la Kozanaj bravuloj, kaj iunokte la domo de Aliŝ ekbrulis. La terurigita Aliŝ eligis bate la fenestron kaj saltis eksteren (la pordo evidentiĝis apogita ekstere), sed la tegmento ruiniĝis, kaj la ekbrulintaj tabuloj kaj traboj surkovris lin. La najbaroj alkuris kaj elfosis Aliŝ-on ankoraŭ viva, sed kun bruligita haŭto. Ili transportis lin en iun kabanon, sed post du tagoj ankaŭ la kabano ekbrulis. La gardisto de Aliŝ forkuris, kaj la perfortulo forbrulis. Lia gardisto sukcesis vidi la bruliginton: monstron en felo, kun kornoj. Tri tagojn li febris, kaj liaj dentoj klakis pro timo.

Timigita pro la sorto de Aliŝ, Meko fermis sin en sia domo, malligis la atakemajn hundojn kaj en ĉiu el la kvar anguloj de la korto starigis po unu kampservisto kun ŝargita fusilo. Ĉirkaŭ unu monaton neniu eniris kaj eliris el tiu ĉi markita domo. Meko sidis ene kun fusilo surgenue kaj drinkadis vinon por silentigi la voĉon de la timo. Li eĉ timis ekdormi kaj se li estis dormetonta, li subite rekonsciĝis kaj pafis al la plafono, kie piedbruis la musoj. Leviĝis pro la alarmo la tuta vilaĝo, kolektiĝis la najbaroj, ekbojis la hundoj. Iun nokton denove lia fusilo pafis, sed neniu leviĝis, neniu alvenis helpe. Matene la kampservistoj trovis sian mastron kuŝanta sur la planko, kun pafiltubo en la buŝo kaj kun rompita kapo. La timo estis frakasinta lin kaj li sin pafmortigis propramane.

Disvastiĝis la onidiro, ke la diabloj aliancaniĝis kun la sklavoj³. La ĉasistoj ĉesis iri al ĉasado. La kuraĝuloj ĉesis eliri ofte el siaj domoj. La turkoj komencis „en lagenario tusi“⁴. En la turka kafejo oni rakon-

¹ Agao — sinjoro (honortitolo ĉe la turkoj).

² Spahio — turka feŭdulo.

³ Dum la otomana jugo la bulgaroj kaj la cetera nemahometana loĝantaro estis traktataj kiel sklavoj kaj nomataj de la turkoj „raja“.

tadis fantazifabelojn pri suspektindaj bruoj, strangaj spuroj, avertaj signoj kaj antaŭsignoj. Turko ne kuraĝis jam resti vespere en la kampo, nek eniri kristanan domon. La malriĉuloj trankviliĝis iomete, ekĝojis la vilaĝanoj timigitaj de la spahioj; ili eksentis la manon de iu nevidebla kaj nekaptebla defendanto, kiu ne volis sin montri al ili, sed ne forĝis venĝi pro ĉiu maljustaĵo kaj ofendo. Se iu turko komencis ĉikani kaj rigardi malbondezire, oni diris al li sekvi sian vojon por ne sperti „la kapran kornon“. La spahio de urbo Kârĝali ne priatentis tiujn ĉi vortojn, prenis de siaj vilaĝanoj tritikon pli ol li rajtis, sed poste oni trovis lin morta, kun kapo enigita en buŝelsitejon kaj trapikita per kapra korno. De tiam la „Kapra Korno“, kiel oni komencis nomi la venĝanton, fariĝis sanga minaco por la malamikoj.

En la vilaĝoj de Zagore oni denove komencis ludi per sakflutoj, denove la fraŭlinoj komencis iri al rondodancoj kaj la junedzinoj pendigi kolierojn sur la koloj, denove komencis brileti arĝentaj bukoj sur ties talioj. En la vilaĝo de Karaivan okazadis la plej viglaj rondodancoj, ĉar tie estis la plej lertaj kavalludantoj⁴. En tiun ĉi vilaĝon komencis venadi la gefraŭloj el la regiono de Stanimaka por geedziĝi per kavaloj kaj sakflutoj. Aliaj simple venadis por danci libervole, ĉar en tiu malfacila tempo ne ĉie estis ebla danci. Kaj jen, dum tia festo en la rondodanco aperis svelta junulino kun fajraj okuloj. Ŝi dancis kun tia koro, tiel lerte saltis, ke la peonio falis de sur ŝia orelo. La junulino kliniĝis por ĝin preni, kaj en tiu momento el ŝia sino falis kaj ekklakis sur la pavimo unu kapra korno. Ŝi kon-

fuziĝis, kaptis la kornon kaj enigis ĝin en la sinon, poste rapidis droni en la bunta festa tumulto.

„Kapra korno!“, „Kapra korno!“ — tiuj ĉi vortoj pasis kiel ekstremo. La sakflutoj ĉesis. La kavalludantoj streĉis kolojn por serĉi per okuloj la strangan junulinon, kaj la fraŭloj staris kiel fulmofrapitaj. Malfeliĉe, en la belulino parencaj okuloj rekonis Marija-n, la filinon de Karaivan. Tio ĉi estis grandega, tikla novaĵo, kiu ekflugis de buŝo al buŝo. Gardi tian novaĵon en sekreto estis neebla. Iu cigano, lignopelvisto, portis ĝin al la turka rotestro. Per multe da policsoldatoj kaj baŝibozuko⁶ li sieĝis la rokojn de Karaivan. Marija defendis sin per pistolo kaj ponardo, sed kompreninte la maleblon savi sin, ekkuris al iu roko kaj anstataŭ fali viva en la manojn de la turkoj — ĵetis sin de tie en la abismon. Svingante lignopecon „la freneza“ Karaivan dispelis la policsoldatojn, kiuj sin ĵetis por ligi lin, traboris al si vojon kaj dromis en la densejon kun pantalone truita de la policanaj kugloj.

En la kabano de Karaivan la turkoj trovis sakon da pintigitaj kornoj. En la kavo por terpomoj ili trafis plej diversajn kostumojn: de maskitoj, almozuloj, ciganoj, en kiuj la sentima hajdutino⁷ kaj ŝia patro faris siajn noktajn promenadojn.

Baldaŭ post tiuj sangoverŝaj eventoj en la monaĥejon de Kuklen „Sveti Vraĉove“ alvenis ĉifonvestita falĉisto kaj proponis resti tie kiel monaĥeja bienservisto. Ĉu iu el la monaĥoj rekonis en lia persono Karavano-n, tion oni ne povas diri. Estas sciate nur, ke en la somero la falĉisto malsaniĝis pro malario. En sia antaŭmorta horo li ekvolis fari konfeson kaj al la konfesprenanto li malkovris, kiu li estas kaj kiel li trafis en la monaĥejon. De tiu ĉi konfeso,

⁴ En Bulgario oni uzis en la pasinteco laĝenaron kiel kruĉon por akvo kaj aliaj celoj. Se oni tudas en tia kruĉo, oni ne povas aŭdi la tusadon.

⁵ Kavalo — paŝtista ligna fluto, bulgara nacia blovinstrumento, produktanta tre molajn kaj dolĉajn sonojn.

⁶ Baŝibozuko — neregula turka armeo.

⁷ Hajduto — popola venĝanto al la turkoj en la epoko de la jugo.

rerakontita poste al la ceteraj monaĥoj kaj transformiĝinta en legendon, mi scias, ke la nura penso de Karaivan post la morto de lia edzino estis la venĝo kaj ke li longe sin preparis por tio, por ke la venĝo estu terura. Li eĉ ŝajnigis sin freneza, por ke oni forlasu kaj forgesu lin. El tiu ĉi konfeso oni scias, ke Deli Mustafa estis kaptita de Marija per ŝnurkaptilo, kiam li estis dormanta en iu legomĝardeno. Tutan semajnon ŝi kondukis lin tra la arbaro per la kaptilo sur la kolo, ĝis fine ŝi enbatis en lin la kornon kaj ĵetis lin en la riveron. Por pafmortigi Kara Memiŝ la sentima Marija surgrimpis ulmon vid-alvide al lia bieno, tri tagojn atendis tie sen akvo kaj pano, ĝis la maljuna voluptulo kaj diboĉulo aperis en la kiosko. Tie, sur la ulmo, ŝi sidis ankaŭ dum la policsoldatoj traserĉadis la arbaron sub ŝiaj piedoj.

La domon de Aliŝ Marija kaj ŝia patro bruligis pere de bulo el kapraj haroj gudromakulita. En tiun ĉi turkan vilaĝon ili penetris kiel vinagro-vendistoj. En la paniko neniu donis atenton al ili. Dume la timigitaj turkoj kuris tien kaj reen kaj pafadis sendirekte en la mallumo, Karaivan kaj Marija portis akvon por estingi la incendion.

Tiuj rakontoj estis vere teruraj, sed tio, kio plej forte emociis la konfesprenanton, estis la konfeso de Karaivan, ke por venĝi pro sia edzino, li iris eĉ kontraŭ la dia leĝo, ekvolinte fari unu teneran knabinon viro-venĝanto. Li mem, kripla je unu brako kaj malbona pafanto, ne kalkulis verŝajne je si mem, tial li transigis ĉiujn siajn esperojn al Marija.

Naŭ jarojn li detenis sian koleron, kaŝis la doloron en sia animo kaj atendis la elkreskon de la knabino, kiun dum la tuta tempo li edukadis kiel knabon. Li vestis ŝin en virovestojn, ĉirkaŭzonis ŝin, tondis al ŝi la hararon kaj instruis ŝin pafi kaj manipuli per jatagano. Facilmova kaj lerta „la knabo“ Marija tutajn

tagojn grimpis post la patraj kaproj, „li“ mem defendis sin kontraŭ lupoj ne malpli bone ol la malnovaj kaj spertaj ŝafpaŝtistoj kaj tiel bone kutimiĝis pafi, ke de tricent paŝoj per la fusilo de sia patro trafis porkan denton. Naŭ jarojn Karaivan premis la molan junulinan animon, alvokadis helpe la tempestojn kaj la ventojn, la lupojn kaj la ursojn, uzis sian tutan sperton kaj ruzecon por forigi de la knabino ĉiun virinecan.

Foje Karaivan rimarkis, ke lia filino sin rigardas en la stanumita kupra telero. Tiam li frakasis ĉiujn kuprajn telerojn en la kabano kaj poste enterigis ilin. Li ne nur tondis ŝian hararon, sed foje eĉ ĉirkaŭbruligis ĝin je la fajro, por ke ĝi neniam plu kresku. Spinbastonojn, tondilojn, kudrilojn — ĉiun virinan aĵon li elĵetis kaj neniigis, por ke ĝi ne veku en tiu ĉi fraŭlino la virinon. Li kun vigla atento observadis, ke ŝi renkontu nek fraŭlon, nek maljunulon, nek viron kaj sukcesis fari el ŝi veran lupomurdanton, kiu senindulge enigadis ungojn en la kolon de ĉiu malamiko.

Marija ĉiam iris antaŭe, kaj la patro lamis post ŝi, ŝajnigante sin jen blindulo, jen ken-vendisto, jen vinagro-vendisto. Ŝi inventadis la ruzaĵojn, transsaltis, kiam estis murbaroj por transsaltado, pafis, kiam estis necesa pafi, kaj enbatis la kornojn en la brustojn de la malamikoj. Ĉio iris tiel, kiel deziris Karaivan, sed okazis io neatendita, kio igis la maljunulon fari nepardoneblan pekon. Dum ili embuskis por bruligi la domon de Meko, iom pli ol semajnon ili pasigis en la kabano de iu ŝafpaŝtisto. Ili kaŝis sin tie, manĝis, dormis kaj tio, kion Karaivan naŭ jarojn kruele premadis, ekmoviĝetis en la animo de la junulino. Marija la hajdutino enamiĝis en la kaŝanto, en la bela ŝafpaŝtisto, kiu eĉ ne suspektis, ke sub la ruĝa vatita vesto de la juna hajduto batas arda virina koro. Laŭ la brilo de la okuloj de Marija kaj laŭ la ruĝaj makuloj sur ŝiaj vangoj, kiuj al-



ternis kun mortpaleco, la sperta patro komprenis, ke la junulino enamiĝis. Kia tempesto ekfuriozis en la animo de tiu ĉi forta kaj terura viro, kia demonia ĵaluzo bruligis lian kordon — oni povas juĝi laŭ tio, ke kiam Meko mortpafis sin kaj ili forlasis la kabanon, Karaivan ŝajnis sin forgesinta sian fajrilon, revenis kaj murdis la ŝafpaŝtiston, por ke Marija neniam povu revidi lin.

Karaivan ne sciis, ke Marija promesis al la ŝafpaŝtisto renkontiĝi kun li dum la ĉimanĉa rondodanco, kaj Marija neniel suspektis, ke ŝia patro estas murdinta la homon, kiun ŝi, la virgulino, pasie ekamis. Ĉu post la rondodanco Marija eksciis, ke ŝia amata ŝafpaŝtisto estas mortinta, aŭ la krimo de ŝia patro restis por ŝi sekreto — ni ne scias. La konfeso de Karaivan eble ĉesis ĝis tie ĉi, aŭ eble la memoro de la konfespreninto perfidis.

Tiun ĉi sangoverŝan historion mi aŭdis kiel knabo de patro Averki — unu tre maljuna monaĥo el la monaĥejo „Sveti Vraĉove“ apud vilaĝo Kuklen. Li ne loĝis en la monaĥejo, sed apud ĝi en kabano, kiun li mem konstruis. Estis onidiro, ke la monaĥejestro forpelis lin, ĉar Averki estis rakontinta pri liaj ŝteloj. La maljuna monaĥo ne sciis, ke la monaĥejestro

havas la abundan benon kaj apogon de la episkopo, kaj subite, en maljuna aĝo, trafis ekster la monaĥejon. Averki vivis per sovaĝaj fruktoj kaj almozoj. Mi vidis lin pisti sekajn maizspikojn kaj, miksitaj kun iom da faruno, baki ilin. Li estis pasia tabakfumanto, sed ne povis aĉeti cigaredojn. Ni, la brutpaŝtistoj, preterpasante lian kabanon, ĉiam aŭdis lin demandi pri tabako. Iufoje ni kolektis tabakfoliojn falintajn sur la kampojn kaj alportis ilin al li, kompanse por kio li rakontadis al ni terurajn historiojn pri la sklavecepekco. Unu el tiuj ĉi historioj estis pri Karaivan kaj lia filino — la hajdutino Marija, nomata ankoraŭ la Kapra Korno. La monaĥo, ĉe kiu li, Averki, estis komencinta sian monaĥecon, estis la sama monaĥeja konfesprenanto, kiu donis al Karaivan la lastan komunion.

Ŝajne ankaŭ nun estas antaŭ miaj okuloj patro Averki — vindita en sia perdinta koloron sutano, kun piedoj volvitaj en peltpecoj, kun lipharoj blankaj, rostigitaj pro tabakfumado. Ĉe ĉiu rakonto pri Marija liaj okuloj ek-larmis. Kraĉante la tabakon emociite, li finadis ciam per samaj vortoj:

— Multaj maljustaĵoj, tamen unu Marija! Tial ne pliboniĝis tiu ĉi mondo!

El la bulgara: Dimitro Haĝiev

Stefka Malĉeva

AL JURIJ GAGARIN

La jaroj al la estonteco flugas —
forpasas la jarcento post jarcent'.
Por ĉiam lasis vi helegan spuron —
unua stel' sur kosma firmament'.

Rideton vian oni ne forgesos
kaj vortojn inspiritajn al homar':
«Por pac' laboru — tiel ni progresos,
ne estu plu militoj kaj amar'!»

Fariĝis vi simbol' de heroeco —
de l'homa penso flug' al estontec',
por la scienc' oferis vi junecon,
memoros vian nomon l'eterne'.

Ekmutis kun dolor' la universo,
ĉar via kor' forbrulis kiel stel'.
Prikantas la homaro vin en versoj.
En kosma historio restas vi juvel'.

La jaroj al la estonteco flugas —
forpasos la jarcento post jarcent',
eterna estos via kosma gloro —
unua stel' sur kosma firmament'!





100 jaroj de la naskiĝo de Elin Pelin

Elin Pelin (1877—1949) estas elstara bulgara verkisto, kritika realisto, membro de la Bulgara Akademio de Sciencoj. Plej granda pentristo de la bulgara vilaĝo, majstro de la mallonga rakonto. En siaj verkoj li pentras la socialajn kontrastojn kaj konfliktojn en la vilaĝo, la tragedion de la malriĉuloj, lian spontan ribelon kontraŭ la maljusta burĝa sociordo.

Al la majstra plumo de Elin Pelin apartenas kelkaj volumoj da rakontoj, la noveloj „La familio Gerak“ kaj „Tero“ kaj multaj humuraj poeziaĵoj.

Elin Pelin

FEINA BIRDO

Ĝi ne estas, frato, vilaĝ' ordinara,
vaste dissemita tra la spac' montara.
La dometoj alte sur la montoj rajdas —
se kukol' kukolas, oni ĝin ne aŭdas.
Tamen ankaŭ tie homoj loĝas vere,
vintre frostas kaj varmigas sin somere,
laboregas, fosas en la ŝtona grundo,
por sekalon havi en la herbabundo.
Malgraŭ tio belas la vidaĵ' sen fino,
dolĉa por okulo kaj por la animo.

Amasiĝis rokoj, pintoj kaj arbaroj,
kiel ĉifonbluzoj sternas sin la valoj,
ĝis rigard' atingas — faldoj, faldoj, faldoj,
de akordiono ŝajne buntaj balgoj.
He, en la altego, kvazaŭ sur breto,
serpentas vojeto. Flugadas birdeto.
Kavernoj kaj rokoj — rigidaj ĉefpastroj,
kaj sur ties ĉapoj paŝtas sin la kaproj.
Krute kaj timige — la kapo turniĝas.
Kaj malsupre Iskar* malklara ruliĝas.

Ja montar' ĝi estas, altajn pintojn havas,
ja montar' ĝi estas — ĝiaj valoj ravas —
super pintoj altaj spiralas aglino,
kaj sin kaŝas lupoj en la vala sino.
Aglin' estas Jana el Vulpa Montkresto,
lupo estas Vute el la Lupa Nesto**.
Ah, mirinda estas Jana, belulino!
Granda, korpulenta, fortega — ursino.
La okuloj ŝiaj — vivantaj marmotoj,
la palpebroj — kampoj rikoltotaj.

Kiam Jana paŝas, la tero fleksiĝas,
kiu ŝin renkontas, tuje devojiĝas,
ĉar kiam ŝi estis malgranda knabino
kvazaŭ ŝin nutris per lakto ursino.
Ŝin altiris ĉiam la sovaĝa loko,
la arbar' timiga, la krutega roko.
Ja ŝi estis vera paŝtistin' naskita,
per antaŭtuk' bunta ĉe lumbo zonita,
sur la ŝultro ĉiam kun baston' kornusa,
kun paprika pasto en sak' pikegusta;
kiam ŝi kondukas paŝte la ŝafaron,
malfaldiĝas tiam antaŭ ŝi montaro,
kaj arbar' renkontas gaje la knabinon
invitante ŝin en sian verdan sinon.
Sur la vojo sternas sin la ombro ĝia
de monteto alta al montet' alia,
ĝojas la arbaro, ŝin karesas sorĉe
kaj per foliaro al ŝi flustras dolĉe:

— Jana, bela Jana, Jana, birdo iĝu,
Jana, bela Jana, turto vi fariĝu —
volu vivi, Jana, vi en mi konstante
kaj el ĉiu arbo min ĝojigi kante!

Ho, kaj kia estis la bravulo Vute!
(Bone, ke dividis ilin Iskar tute).
Estis Vute juna kiel ŝi, senmanka,
kiel ŝi paŝtisto estis Vute ankaŭ,
el la koro lia ŝprucis milda amo
kuracanta kvazaŭ saniga balzamo.
Kiel profesor' li estis inteligenta,
kiel oratoro saĝa elokventa.

* Iskar — rivero tra la Balkano.

** Vulpa Montkresto kaj Lupa Nesto —
elpensitaj nomoj de vilaĝoj.



Ili renkontiĝis ĉe Iskâr rivero :
 ŝi — herbeje, li — sur rokbordero,
 ambaŭ ili tien venigis ŝafarojn
 soifantajn por la riverakvoj klaraj.
 Ili staris tie. Ŝi lin ekrigardis. . .
 Bunta bird' al lia koro tuj eksaltis
 kaj lin bekis dolĉe, dolĉe kaj dolore,
 eĉ ne sangoguto restis en la koro.
 Tian pikon strangan ĝis nun ne spertinte,
 lia kor' komencis batî forte, tinte.
 Ne eltenis Vute, la bastonon svingis
 kaj ŝafaron sian en vepron kurigis.
 Kaj li en la koro aŭdis tondrajn sonojn,
 en oreloj liaj pafis mil kanonoj.
 Antaŭ la okuloj flamis incendioj,
 post li eksplodadis rido, gajaj krioj.
 Tuj en la riverajn ondojn li sin ĵetis
 kaj ekplaŭdis kiel cigno liberama.
 — Panjo mia, ĉu mi ne malsanas, —
 diris Vute kaj sidiĝis por ekspiri,
 frotis sian frunton penson reakiri.

La sekvantan tagon la diablo prenis
 Vute kaj lin ree tien ĉi altrenis.
 Vute vidas — Jana ĉe la bordo
 staras kaj lin manĝas per sia rigardo.
 Ŝi al li parolas kun petol' kuraĝa :
 — He vi, Vute, Vute, he junul' sovaĝa,

vi hieraŭ flugis en la malproksimon —
 ĉu vi vidis lupon, kruelan ursinon ?
 — Ne, mi vidis, Jana, vidis. . . kolombinon.
 — Vi ne estas grajno, por ke ŝi vin beku.
 — Mi ne estas arbo por la birdon kaŝi. . .
 — Sed vi havas manojn, por ke vi ĝin kaptu!
 — Ĝi ne estas, Jana, birdo ordinara,
 sed feina birdo, birdeto arbara.
 Jana lin rigardas, ridas kaj ridegas :
 — Vute, Vute, Vute, vi min ne posedos,
 ĉar feina vere estas koro mia.
 — Mi vin kaptos tiam per herbo magia.
 El fadenoj silkaj reton mi preparos,
 la arbaron tutan per rubusoj baros.
 — Sed inter ni Iskâr onde ja serpentas. . .
 — Eĉ al la deklivo sin ĝi tuj direktos,
 se ni, bela Jana, petos ĝin fervore,
 se ni, kara Jana, amos nin tutkore.
 — Mi ne petus, Vute, sed rekte, kuraĝe
 la riveron tuje mi transirus naĝe.
 — Jana, diru, ĉu al mi vi edziniĝus !

Jus eldiris Vute tiujn dolĉajn vortojn,
 Jana rekte saltis en la riverondojn.
 Kaj eknaĝis haste kiel fiŝo Jana,
 ŝaŭme ĉirkaŭŝprucis akvo diafana.
 Jen eliris Jana ĉe la transa ŝtono
 kaj brakumis Vute kun la gregbastono. . .

El la bulgara: Asen Grigorov

Rajno Ĉipilev

LA STANDARDPORTANTO

Germana Demokratia Respubliko,
 urbo Lajpcig (Leipzig). La vagonaro
 haltis ĉe la stacidomo. Nia grupo
 elvagoniĝis. Al Lajpcig veturis mul-
 tege da fremdlandanoj — ekskursan-
 toj, turistoj k. a. La vojaĝantoj ama-
 siĝis ĉe la elirejo.

— Kamarado Ruev, Esperanta stan-
 dardo verŝajne! — ekkriis kelkaj bul-
 garoj el nia grupo. — Verda flago,
 jes, jes!

— Ivan, vidu la flagon! — diris
 ankaŭ Mira, lia edzino, montrante per
 la dekstra mano. — Verda flago, Ivan!...

Ankaŭ Ivan Ruev vidis la verdan
 standardon en la mano de alta viro.
 La standardportanto estis unu kapon
 pli alta ol ĉiuj homoj ĉirkaŭe. Liaj
 okuloj, olivnigraj kaj grandaj, atente
 ĉirkaŭrigardis.

— Saluton, samideano! — diris

laŭte Ivan, proksimiĝante al li. — Ĉu
 vi serĉas iun?

— Saluton, amiko! — ĝoje respon-
 dis la altulo kaj klarigis: — Mi ser-
 ĉas nian Esperanto-grupon. Ni estas
 ekskursantoj el Kubo.

Poste li demandis, el kiu lando estas
 Ivan kaj liaj grupanoj, ĉu ankaŭ ili
 estas esperantistoj. Ivan klarigis, ke
 ili ankoraŭ ne estas esperantistoj, sed
 nur amikoj de la Internacia Lingvo,
 estontaj esperantistoj.

— De kie vi alvenis kaj kien vi
 vojaĝas? — demandis Ruev.

— Nia grupo jam vizitis Berlinon. . .
 Post Lajpcig, laŭ programo, ni vizitos
 Vajmar, Buhenvald, Drezden.

— Nia grupo jam estis tie, — kla-
 rigis Ruev. — En Drezden ni rigar-
 dis la famajn Cvinger kaj la bildga-
 lerion. Dum la vizito en Vajmar ni

estis en la muzeoj-domoj de Gjote kaj Ŝiler — la du genioj de Germanio. . . Poste ni vizitis Buhenvald. . . Jes, tien oni pilgrimas el la tuta mondo. En Buhenvald ni vidis muzeon pri la krimoj de la faŝistoj. . . Oni neniam povas forgesi ĝin. . .

Dum Ivan kaj la kuba esperantisto parolis, ĉiuj bulgaroj silentis. Post la foriro de la kubano ili ĉirkaŭis Ivan kaj surŝutis lin per demandoj: ĉu li kaj la standardportanto plene interkompreniĝis, ĉu ĉiuj el lia grupo same portas verdajn flagojn, ĉu en Kubo estas multaj esperantistoj ktp. Nur Mira ridetis silente kaj kore ĝojis, ke ŝia edzo estas esperantisto. . .

Eble Ivan Ruev kaj liaj samlandanoj facile estus forgesintaj pri la esperantisto el Kubo, se ne okazis nova renkontiĝo kun li kaj la tuta kubana grupo. Kiel ĉiuj bulgaroj, kiuj vizitas Lajpcig, la grupo de Ivan vizitis la muzeon de Georgi Dimitrov. Ili trarigardis la apartajn halojn kaj fine eniris la halon, en kiu okazis la historia proceso kontraŭ Dimitrov kaj liaj kamaradoj. Ĉi tie ĉiuj respektis silentis. Jen oni mallumigis en la halo. Ĉiuj streĉis la orelojn. Ankaŭ Ivan, kiu estis aŭdanta la batadon de sia koro. Regis absoluta silento.

Komenciĝis aŭdigo de la defenda parolado de Georgi Dimitrov antaŭ la faŝista tribunalo. . . La voĉo de la oratoro estis forta kaj impona per sia vigleco kaj argumentoj. Dimitrov atakis.

Ivan Ruev aŭskultis retenante la spiradon. Flanke de li ankaŭ Mira kaj la aliaj bulgaroj aŭskultis tiel. . . Versajne ĉiuj en la halo same. Se muŝeto ekzumus, ĉiu aŭdus la zumadon. Kun streĉitaj oreloj Ivan kvazaŭ tute ne palpebrumis en la mallumo. Liaj nigraj okuloj estis largigitaj eksterordinare. Ili kvazaŭ vidis la oratoron — tian, kia li estas sur la fotomuntaĵo de Ĝon (John) Hartfeld. . . Dimitrov, kliniĝinta antaŭen, ŝajne intencas flugi kiel aglo aŭ sin ĵeti sur la dikegan

paradan pupon — la rajhministarn Gjoring. Vere, la balkana aglo kurĝe atakis. . .

La penso de Ivan por momento ekflugis al Bulgario. Eksa deputito de la Patrolanda Fronto en la parlamento, li rememoris pri la batalo de Georgi Dimitrov kontraŭ la perfida opozicio, pri liaj historiaj paroladoj kiel ĝenerala sekretario de la Bulgara Komunista Partio kaj ĉefministro de Popola Respubliko Bulgario, pri liaj renkontiĝoj kun ordinaraj bulgaraj homoj — laboristoj, vilaĝanoj, intelektuloj, pri lia profunda amo al la patrolando kaj la popolo.

Ivan ne sentis, ke oni jam ĉesigis la paroladon de Dimitrov. En la halo denove regis lumo. Sed li ŝajne ne vidis tion kaj plue sidis sur sia seĝo. Mira tuŝis lin je la ŝultro kaj petis lin leviĝi.

— Oni jam eliras el la halo! — flustris ŝi.

Sur la placo antaŭ la muzeo okazis io neforgesebla. Etendinte ambaŭ manojn kiel flugiloj de aglo la altulo el Kubo — la portanto de la verda flago, kuris al Ivan kaj varme ĉirkaŭprenis lin.

— Heroo! Georgi Dimitrov estas granda heroo! — preskaŭ kriis la kubana esperantisto. — Heroo kaj gvidanto en la batalo kontraŭ la tiranoj en la tuta mondo!. . .

— Jes, — modeste konsentis Ivan. — Li estas rimarkinda figuro de la internacia komunista movado. . .

— Jes! Jes! — plue entuziasme parolis la kubano. — Ankaŭ ni lernas el la raporto de Dimitrov en la Sepa Kongreso de Kominterno. . .

— Vere, — rediris Ivan Ruev korusita, — la homaro neniam forgesos la batalon kaj la instruon de Georgi Dimitrov.

La grupo de la bulgaroj kaj la kubanaj esperantistoj, altiritaj ŝajne per magnito, ĉirkaŭis la interparolantojn. La kubanoj demandis rekte Ivan en Esperanto, kaj li tuj respondis. La bul-

(sekvas sur p. 28)



NI LABORU !

Ni laboru ! Strebu ni kuraĝe :
per la cerb', per manoj, per la kor' ;
vivajn farojn ni plenumu saĝe
sub la gaja bruo de l'labor'.

Ni laboru ! Tiu glora vorto
eksonegu kiel vera ŝtorm',
kiel sonoril' en plena forto,
kiu vekas el profunda dorm' !

Ni laboru ! Levu ni la flagon
per ĉi vorto — al prosper' la pont' !
La laboro — sav' el sklava plago —
estas ideal' de l'nova mond'.

Ni laboru ! Labor' estas fonto
de feliĉo homa kaj progres'.
La mallaboremo estas honto,
malriĉec' konstanta kaj regres'.

Sofia, 1899

Stefan Sokolov

Ni laboru ! Virte ni daŭrigu
laŭ gepatra vojo kaj spirit',
ties ŝvitlabor' nin ne timigu :
ĉion ŝuldas ni al tiu ŝvit'.

Ni laboru ! La mallaboremo
estas malĉasteco por la kor' —
tent' danĝera al la diboĉemo
kaj kunulo de la malhonor'.

Ni laboru ! Ĉar armil' ne estas
pli efika ol la ŝvitlabor' ;
ĝi ne trompas kaj fidela restas,
venkas ĉion en decida hor'.

Ni laboru kune, sen ripozo !
Vivu la labor' ! Ni scias, ke
de l'viv' en la maro furioza
estas ĝi de Noa la arke'.

El bulgara : Simeon M. Simeonov

RENKONTIĜO KUN IVAN VAZOV

Ce la vivoplena bulvardo „Rakovski“, ĉirkaŭita de grandaj malnovaj kaj novaj konstruaĵoj, troviĝas lia modesta duetaĝa malhela flava domo. Sur la muro apud la enirpordo — marmora plato kun surkribo: „Ĉi tie vivis, laboris kaj mortis la nacia poeto Ivan Vazov — 1850—1921.“

Mi premas la tenilon de la pordo kaj eniras. Mezaĝa virino afable akceptas min, petas min lasi la tekono, akompanas min kiel deziratan gaston. En la momento ne estas alia vizitanto krom mi. Mi supreniras la lignan ŝtuparon kaj en la vestiblo de la supra etaĝo konata objekto altiras mian rigardon: miniaturo de la fama ĉerizligna kanono. Mia imago revivigas la neforgeseblan heroon Borimeĉka (Ursovenkanto) el la mondfama romano de Vazov „Sub la jugo“¹. Mi rememoras, kiel Borimeĉka avertas la virinojn kaj la infanojn de ribelinta Klisura ŝtopi per vato siajn orelojn, ĉar la tondro de la ĉerizkanono surdigus ilin. Ho ve! La ĉerizkanono krevis sen

tondri, sed la ebriiĝo de la ribelinta popolo ne havis limon. Ĝi kantis:

Leviĝu vi, anar' fidela,
ne volas sklavoj esti ni! . . .

Per kanonoj, farataj de ili mem el ĉerizarbaj trunkoj, kaj kun silikpafiloj la kvinjarcentaj bulgaraj sklavoj kuraĝis kontraŭstari la grandan otomanan imperion. . .

La portreto de la verkisto, kroĉita sur la muro malantaŭ la miniatura ĉerizarba kanono, memorigas pri la vortoj, kiujn li skribis: „La bulgara nacia spirito neniam atingis tian altan. . .“

Mi staras antaŭ la laborĉambro de la poeto. Ordinara skribotablo. Ansera plumo. Flanke — telefonaparato de malnova modelo. Ŝranko kun libroj. Sur la vidalvida muro pendas majstre pentrita portreto de profesoro Ivan Ŝiŝmanov, intima amiko de Vazov. Nura luksaĵo en tiu ĉi modesta internejo estas la lustro kun tri lampoj. Por momento mi imagas, ke ili lumas, ekstere la urbo dormas kaj la poeto

verkas. . . Ĉe liaj piedoj dörmas la hundeto. . . Mi ekĝemis. Atestanto de lia verkado, de liaj konversacioj kun interesaj personoj de tiama Sofio, nun la ĉambro silentas senviva. Nur la remburita nigra hundeto staras sur la tapiŝo, ĉiumomente preta sekvi sian mastron.

En la dormoĉambro de la poeto videbliĝas malnovmoda lito, pelvo kaj vazo por lavado, vitra ŝranko kun liaj vestaĵoj. Je la alia flanko de la vestiblo — ĉambro de la patrino de Vazov, fidela kunirantino dum lia tuta vivo.

En la apuda ejo troviĝas bone aranĝita ekspozicio de diversaj objektoj, ligitaj kun la vivo de la verkisto.

Mi malsupreniras la ŝtuparon, adiaŭas la kuratorinon de la muzeodomo kaj eliras sur la bulvardon. Sed miaj pensoj daŭre restas ĉe la poeto. Kvazaŭ li paŝas vice kun mi, altega, kun jam grizaj kaphararo kaj lipharoj. Li tenas la bastonon, kaj la nigra hundeto, konstanta akompananto en liaj promenadoj tra la urbo kaj la urboparko, postkuretas. La poeto ne povas rekonii sian Sofion! Vice kun la malnovaj domoj — novaj, multetaĝaj modernaj konstruaĵoj. Sur la asfaltitaj stratoj anstataŭ fiakroj — torento da aŭtoj, kaj sur la trotuaroj — homoj. . . multe da homoj. Eĉ ne unu konato inter ili. Mi klarigas, ke ne nur tio estas la nova Bulgario, ke lia surprizo multege pligrandiĝus, se li vidus kiel en grandedaj fabrikoj la nuntempaj bulgaroj produktas maŝinojn kaj kemiaĵojn, kiuj laŭ sia kvalito ne cedas al la fremdlandaj. Sed eble plej multe ĝojigus lin nia nova vilaĝo, kies mizero li iam tiel bildece prezentis en sia „Venu vidi nin!“ Li konvinkiĝus, ke en socialisma Bulgario la laboro, liberigita de la kapitalismaj katenoj, kreas miraklojn.

Nesentebles mi atingis la ĝardenon antaŭ la preĝejo „Sankta Sofio“ kaj haltas ĉe lia impona monumento. Kun libro en la mano li sidas vidalvide al

la malnova konstruaĵo de la soveta ambasado.

Rusio, kiom ravis nin
ĉi nomo kara, nomo sankta. . .

La amo al la pli granda slava frato sonas en la poezio de Vazov kiel lia testamento al ĉiuj bulgaroj.

Mi direktiĝas al la kontraŭa flanko de la ĝardeno, kie troviĝas la tombo de la poeto. Anstataŭ kruco — malhelgriza ŝtonego el monto Vitoŝa, simbolo de lia granda amo al la bulgara naturo. Apud ĝi — lanterno kun ĉiam lumanta ruĝa lampo. Super la ŝtonego granda plorsaliko etendas al la tero maldikajn branĉetojn. Puncaj papavoj ridetas sur la freŝa verda gazono. Proksime brilas la oraj kupoloj de la katedralo „Aleksandro Nevski“. Kelkajn minutojn mi restas ĉi tie en adorplena kontemplo.

Vazov! Klasikulo de la bulgara prozo kaj poezio. Kombino de granda talento kaj arda patriotismo. Kiel lernanto mi legis ĉiujn liajn verkojn, skribis diligente pri ili, kiam la instruisto de literaturo postulis tion. De tiam pasis multe da tempo, kaj nun, starante antaŭ lia tombo, mi sentis konfuzon. Absorbite de la ĉiutagaj zorgoj, de la torento de libroj, gazetoj kaj ĵurnaloj, de la kino kaj televido, mi ne tuŝas ofte la volumojn de lia verkaro. Sed li, nia klasikulo, ne maljuniĝas. Kaj neniam maljuniĝos, ĉar la bildoj, kreitaj de li, restas ĉiam vivaj.

(El paĝo 26)

garoj direktis demandojn al la kubanaj esperantistoj pere de Ivan, kaj li tradukis. . . Sur la bela placo antaŭ la muzeo okazis io simila al internacia mitingo kun multaj oratoroj, ĉar ĉiuflanke estis arde parolantaj grupoj el diversaj popoloj. Kaj ĉie oni povis aŭdi la nomon de Georgi Dimitrov kaj de Popola Respubliko Bulgario.

¹ Aperinta ankaŭ en Esperanto.



EN LA FABELA SILENTO

Elstaras en blanko vestitaj la pinoj. . .
La neĝo pikbrilas en la okuloj.
Nenia pepado de birdoj en sinoj
de l'morto brilanta, nur sunaj makuloj
en la fabela silento.

Sub blanka sternaĵo dormetas la tero. . .
Nenie vidiĝas postsigno de homo.
Tra la morteco de l'blua aero
ŝvebas nek kanto, nek flustro, nek sono
en la fabela silento.

Obsedas l'animon la fort' de l'silento
ĉe la vidaĵo de tiu terpeco. . .
Vekiĝas nevole en koro la sento
pri la soleco kaj forlasiteco
en la fabela silento.

D-ro Stefan Kadiev

Ing. Dačo Daĉev

Nia bela patrolando

LA ENERGETIKA GIGANTO «BOBOV DOL»

Antaŭ milionoj da jaroj en ĉi tiuj lokoj kreskis grandegaj arboj. Ili kaptis la energion de la suno kaj kolektis ĝin en siaj gigantaj trunkoj. Poste la tavoloj de la grundo dislokiĝis kaj la grandega arbaro estis kovrita de humo kaj ŝtonoj. Post aliaj milionoj da jaroj la montara deklivo estis kovrita de etaj arbustoj, inter kiuj sin paŝtis ŝafaroj. Ĝuste tion trovis la filo de reĝo Samuil, nomata Aron, kiam li ricevis de sia patro tiun pecon da tero. Sur la deklivoj de la malalta montaro ekloĝis vilaĝanoj. Ili konstruis domojn, preparis al si plugilojn kaj ekplugis la grundon.

Venis nova tempo. La scienco malkovris la elektran energion. Ĝi malkovris ankaŭ, ke en la ŝtonkarbo estas akumulita suna energio, kapabla doni forton kaj riĉaĵon al la homoj. La loĝantoj de Bobov Dol komencis ŝoveli la grundon kaj eligi la sunan energion.

Ŝtonkarbo troviĝas multloke sur la tero. Ĝi estas energia rezervo, al kiu la homaro delonge alpaŝis. Sed

DIRU TRI VORTOJN!

Laŭ aleoj senhomaj, laŭ padoj
ree vagas ni ĝis la maten'. . .
Ree muta vi estas, amato:
nur silento, timemo, sinĝen'. . .

«Je vous aime», «Liebe dich» — diras ĉiam,
kvazaŭ sidas vi dum lecion'.
Ĉu vi perdis pro am' kapon vian?
Ĉu forgesis pri rus-leksikon'?

«Ja ljublju vas!» — tri vortoj. . . Ho, kara,
estas vivo sen ili turment'.
Diru do al mi ilin klare
patrolingve, kun flamanta sent'!

Se vi volas sciigi tutmonde
pri am' nia, do mi petas vin:
ne germane, ne france, nur esperante
«Mi vin amas!» — ripetu sen fin' . . .

El la rusa: Antonina Tonti

kiel longa estas la vojo inter la peco da karbo kaj la elektro, kiu lumigas la lampon kaj movas tramon, maŝinon, fabrikon! La transformado de la ŝtonkarbo en elektran energion estas la tasko de la elektra centralo.

Kaj tiu ĉi estas ido apenaŭ de nia jarcento, de ĝiaj scienco kaj tekniko. Miloj da ŝafistoj kaj plugistoj povas iri sur la deklivoj de Bobov Dol, sed la karbo neniam ellasus de si mem la benatan forton.

— — — — —

Ni staras apud pli ol 200 metrojn alta bunta kamentubo, spiranta per plena brusto. Ĝia fundamento havas diametron de 36 metrojn, ĝia krono — 8 metrojn transverse, tuŝante la ĉielon. Apud ĝi rekte staras la betonaj vaporspirantaj malvarmigejoj kun komuna surfaco de kelkmil kvadrataj metroj. Flanke de ĉi tiuj gigantoj leviĝas la 70-metraj kaldronegoj, kie brulas la pulverigita karbo. Tra longaj ŝtalaj tuboj alfluas torentoj de akvo. La akvo kaptas la varmon kaj transformiĝas en forte premitan vaporon. Sub la alta premo

la vaporo trapasas tubojn por atingi per giganta forto la elektrogenantajn turbinojn. Ĉi tie naskiĝas la povoplena elektra kurento, kiu laŭ kupraj dratoj transportiĝas en la elektran ringon de nia patrujo. Pere de ĝi la elektra energio eniĝas en ĉiun fabrikan, en ĉiun vilaĝan mastrumon, en ĉiun urban kaj preskaŭ en ĉiun vilaĝan domon por movi motorojn, por lumigi la lampojn, por funkciigi elektrajn hejtplatojn, radioakceptilojn kaj televidilojn, de kiuj oni komencas aŭdi belan muzikon aŭ spekti la miraklon de la televido.

Kun vera admiro ni rigardis la pendantan en subtegmenta korbo kranistino Marina, kiu per lertaj movoj de siaj delikataj manoj levis kaj demetis la grandegan korpon de la nova maŝino kun registrita pezo de 50 tunoj. Ĝin ne povus levi eĉ 500

fortaj viroj. Sed jen Marina povas. Forton al ŝi donas la potenca elektrocentralo, la integrado de la Soveta, Pola, Germana kaj Ĉeĥoslovaka socialismaj respublikoj, la tuta socialisma mondo.

Nia termoelektra centralo Bobov Dol estas enkluzivita en la ringon, kiu potence ĉirkaŭas nian Patrujon kaj faras ĝin pli riĉa kaj pli bela. Por tion konstati sufiĉas nur ĵeti rigardon al la ĉirkaŭaj loĝlokoj. La lokaj loĝantoj jam ŝanĝis profunde sian vivmanieron. La malnovaj, kadukaj dometoj estas anstataŭitaj per solidaj, vastaj, sunoriĉaj domoj, kun belaj ĝardenetoj. Apud la domoj de multaj loĝantoj atendas iliaj propraj aŭtomobiloj. Vere nur unu rigardo sufiĉas por konvinkiĝi, ke ĉi tie loĝas homoj, kies vivbezonoj estas kontentigitaj.

Nevena Nedelĉeva

ĈE LA PORDO DE ESPERANTISTA KLUBEJO

Loĝanto de malproksima monta vilaĝo legis ie pri la internacia lingvo Esperanto kaj estis tre scivolema aŭdi ĝin. Veninte en la urbon pro iu laboro li demandis ankaŭ pri la esperantista klubejo kaj post kelka serĉado trovis ĝin.

La pordo estis duone malfermita, kaj la vilaĝano ĝoje streĉis la orelojn por aŭdi la interesan lingvon. Komence li povis kompreni nenion, ĉar la paroloj estis mallaŭtaj.

— Nature, — pensis la vilaĝano, — tio estas grava afero, nekonata lingvo, tial mi nenion komprenas.

Sed iom post iom la voĉoj en la klubejo plilaŭtigis kaj la vilaĝano kun granda ĝojo rimarkis, ke li komencas kompreni iujn vortojn. Post kelkaj minutoj li konstatis, ke li komprenas preskaŭ ĉion.

— Vidu nur, — pensis li, — kiel facila estas tiu internacia lingvo Esperanto. Kiam mi revenos en la vilaĝon, mi diros al miaj samvilaĝanoj, ke sufiĉas nur duonhoron aŭskulti

por kompreni ĝin.

La kunveno finiĝis kaj la homoj komencis eliri el la klubejo.

— Ĉu tie ĉi estas la esperantista klubejo? — demandis la vilaĝano.

— Jes, — konfirme kapjesis junulo, — vidu la verdan stelon sur la fenestro kaj la surskribon super la pordo.

— Kaj ene kunvenas la adeptoj de tiu lingvo?

— Kompreneble, — respondis aŭtoritate la junulo. — Tie ĉi kunvenas esperantistoj.

— Pri kio ili interparolis?

— Nature, pri diversaj Esperanto-problemoj.

— Mirigis min la facileco de tiu lingvo. Dum unu horo starante ĉe tiu ĉi duone malfermita pordo mi komprenis preskaŭ ĉion.

— Sed ni ne parolis en Esperanto, ni parolis en nia gepatra lingvo, — ridetante klarigis la junulo.

— Ĉu vere?!

— Jes.

— Do, tiam vi ne estas esperanti-



NE DIRU AL MI

Ne diru al mi, ke vi min amas,
ne promesu al mi la stelojn.

Ĉio alvenas

kaj foriras,
eternaj estas nur niaj faroj.

Donacu al mi

minutojn emociajn,
tutan mondon

en unu kiso. . .

La varmon de viaj manplatoj,
la doloron kaj ĝojon

de sento brulanta!

Por ke ekfloru mia animo,

por ke la mondo malkovriĝu hela. . .

Sen amo

rompiĝas la revoj,

sen amo

ne estas korsopiro

kaj kanto bela!

Ne diru al mi, ke vi min amas,
ne promesu al mi la stelojn!

Post tempo oni

forgesos la vortojn,
eternaj estas nur niaj faroj.

Toma Ajolov

SOVAĜA NATURO*

Sur monta herbejo
printempo jubilis —
en mia animo
tenera sent' trilis.

Aeron ornamis
birdkant', florodoro —
feliĉa pulsadis
en brusto la koro. . .

Kaj jen papilio
flugvenis de ie,
kun ard' ĝi la florojn
ekkisis pasie.

Nun ĝia feliĉo
elektre min ŝokis —
de l'kora profundo
envion elvokis.

Subite, fulmfluge
bird' raba alvenis,
insekton koloran
de l'flor' ĝi fortrenis. . .

Animo indigna
maljuston kondamnis —
sovaĝan naturon
proteste mi damnis.

* Ricevinta en la internacia literatura konkurso en Como — Italio, 1976 j. la premion „Ora Manconi“.

Verdaj steloj

Stojan Kostadinov

Mateniĝas

Tie, kie la blua ĉielo klinas sian frunton por pasia kiso kun la fekunda tero, tie aperas la suno kaj malrapide leviĝas super la tera vastaĵo. La varmaj sunradioj vekas ĉion al aktiva vivo.

Mia nepo malfermas okuletojn kaj vikle ekpaŝas al la malfermita fenestro, tra kiu sunradioj abunde invadas la ĉambron. La suno gaje ĉirkaŭprenas la malgrandan hometon, kaj li rapidas por saluti ĝin.

Vestita nur en ĉemizeto kaj nudpieda, la nepo plandas sur la planko kaj ekstaras ĉe la fenestro. Kun ĉielbluaj okuletoj, stumpnaza, orhara kaj korallipa li observas la vekigantan mondon.

Ĉiumatene milionoj da infanoj sur la terglobo malfermas okuletojn kaj observas la mondon. La suno karesas iliajn harojn kaj vekas ĉe ili kaj iliaj gepatroj esperon pri feliĉo kaj hela estonto.

Kiom belege estus, se la infanoj ne konus la militon! Se ne vidiĝus larmoj sur iliaj vizaĝoj. Se oni ne verŝus ilian sangon kaj la sangon de iliaj gepatroj. Se nur paco regus sur tiu vekiganta por feliĉo tero.

Sur la strato marŝas taĉmento da laborsoldatoj. Proksime ili konstruas uzinon.

— Avo, kiam mi plenkreskos, mi estiĝos laborsoldato!

— Jes, laborsoldato. Bone. Kaj vi konstruos vivon sen pafiloj, sen militoj. Via taĉmento estos armita per lev- kaj fosmaŝinoj. Viaj tankoj estos betonmiksiloj kaj buldozoj. Same kiel tiuj laborsoldatoj vi konstruos uzinojn — uzinojn de la vivo, de la paco, uzinojn de feliĉo sur la terglobo.

Ni recenzas

LA NOVA «KOLEKTANTO»

Jam sepan jaron vivas bulteno „Kolektanto“ — organo de la Sekcio de Esperantistoj-Filatelistoj ĉe BEA. Ĝis la 39-a nacia E-kongreso en Ruse 1976 pri ĝi zorgis precipe Ljubomir Leviĉarov, kiu nun estas honora prezidanto de la sekcio.

En la sekcia kunveno enkadre de la 39-a kongreso estis elektita nova estraro. Unu el ĝiaj gravaj taskoj estas daŭrigi la eldonadon de „Kolektanto“, plibonigi ĝian formon, variigi la enhavon kaj aperigi ĝin ofsete.

Per la bulteno la sekcia estraro celas organizi en unu tuto la esperantistojn-hobianojn kaj kolektantojn (ne nur filatelistojn), hulgarojn kaj eksterlandanojn.

La streboj de la estraro estas spegulitaj jam en la varia enhavo de la unua ĵus aperinta ĉi-jara numero. Nature, ĝi estas interesa unualoke por esperantistoj, sed nepre interesigos ankaŭ multajn neesperantistojn vekante ĉe ili deziron lerni Esperanton — la lingvon, kiu tiel bone faciligas la internaciajn kontaktojn kaj ĉiuspecan kolektadon.

Parto de la enhavo de la unua ĉi-jara numero estas ligita kun la Internacia Jaro de la Infano, proklamita de UNESKO.

En la kajero estas tuŝitaj temoj pri: filatelo, muzeoj, ŝako, filokartio — eldonaĵoj de UNICEF (bildkartoj kaj kalendaroj), fotoarto, ekslibrisoj. Krome estas lingva ekzerco el la Dua Libro de Esperanto 1888 (Zamenhof), artikolo pri Islando — la lando de la ĉi-jara Universala Kongreso, kanto kun muziknotoj, viktorigo k. a.

Multaj ilustraĵoj ornamas la tekstojn.

Ĉiu numero de la bulteno entenas 20 paĝojn. Ĝi aperos 4-foje en la jaro kaj estos sendata al 70 landoj.

Ĉiu interesigita esperantisto aŭ neesperantisto povas ricevi senpage la unuan numeron (por konatiĝi) je adreso: „Kolektanto“, 1407 Sofia, poŝtkesto 46.

La estraro de la sekcio esperas, ke la esperantistoj kaj la E-societoj akceptos favore „Kolektanton“ kaj helpos por plenumo de ties noblaj taskoj.


Ĉiuj hobianoj kaj kolektantoj estas bonvenaj kiel membroj de la sekcio, kiel abonantoj kaj kunlaborantoj.

Dimitro Denĉev

Solvo de la 8-marta enigmo en n-ro 3

„La estimo al la virino estas mezurilo por la progreso de la nacio en la sociala vivo!“

Inter tiuj, kiuj korekte solvis la enigmon, ni lotumis premie 3 E-librojn.



La ciferojn enmetu laŭ la horloĝmontrilo.
EN KIU JARO...

1. naskiĝis Zamenhof?
2. okazis la unua UK de Esp-to?
3. estis eldonita la originala verkaro de Zamenhof?
4. en Svedujo komencis aperi gazeto „Lingvo Internacia“?
5. estis fondita la Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE)?
6. la verda stelo iĝis simbolo de Esperanto?
7. aperis „Historio de la lingvo Esperanto“?
8. estas fondita UEA?
9. aperis „Analiza historio de E-movado“ de Ernst Drezen?
10. naskiĝis Kolomano Kalocsay?
11. okazis la 10-a UK de Esp-to?
12. en Nurnbergo aperis gazeto „La esperantisto“?
13. oni komencis uzi Esperanton en la telegrafio?
14. estis eldonita la unua poŝtmarko kun E-teksto?
15. aperis „Historio de la lingvo Esperanto“ de Edmond Privat (II parto)?
16. mortis Zamenhof?

Demardas Gaidamavičius Stasis

stoj, kaj vi ne devas kunveni en tiu ĉi klubejo. . . Por paroli la nacian lingvon oni ne bezonas veni ĉi tien. Sed mi ne volas perdi plu mian tempon.
— Kial? — mirigite demandis la junulo.

— Mi devas trovi esperantistojn por aŭdi tiun interesan lingvon Esperanto.

La vilaĝano foriris kaj la hontigita junulo restis kun klinita kapo.



FORPASIS LJUBA GRIGOROVA

Kiuj vizitis la hejmon de nia E-veterano kaj elstara E-poeto Asen Grigorov, bone konas lian edzinon Ljuba. Si ne estis esperantistino, sed pro la ofta aŭskultado de E-paroloj tre bone orientiĝis en la senco de la E-konversacioj. Ĉiam kun rideto Ljuba invitis la vizitanton al la ĉambro de Asen. Ŝia ĉarma maniero de konduto ravis ĉiujn. Kaj ŝi kondutis tiel ne nur en trankvilaj momentoj de sia geedza vivo kun Grigorov, sed ankaŭ en momentoj plenaj de risko kaj minaco. La hejmo de familio Grigorov fakte estis kunvenejo de la estraro de Bulgara Laborista E-Asocio (BuLEA), kiu, formale laŭleĝa organizaĵo, estis traktita de la polico kiel nelaŭleĝa. Ne hazarde el la aktivuloj de BuLEA, kiuj kunvenadis ĉe Asen kaj Ljuba, estis mortigitaj de la faŝista potenco Nikola Sopov, sekretario de BuLEA, Angel Ivanov (Angelo) — redaktoro de „Rabselkor“, eldonaĵo de BuLEA, multaj estis ĵetitaj en malliberejon (Simeon Petrov, Ivan Keremidĉiev ka.).

Kamaradino Ljuba zorgis pri tiuj danĝeraj gastoj kiel pri siaj propraj infanoj. Si portis sian pezan ŝarĝon kaj neniam plendis: forpasis ŝia unuenaskita infano, filino — tre dotita poetino, forpasis ŝia frato — mortigita de la faŝistoj, pereis dum

Lingva laboratorio

PROponu LA PLEJ BONAN TRADUKON!

Kiamaniere vi tradukos tiun ĉi frazojn kaj vortojn?

Да беше ми показал картината!

Дано днес не вали!

запаянко

кръшкач

денонсирам

планетарий

Sendu viajn proponojn! La plej trafaj aperos en „Bulgara Esperantisto“. Ni laboru aktive en nia verda laboratorio!

bombardo de Sofio ŝia fratino, estis arestita kaj enkarcerigita ŝia edzo, forpasis la patrino. Ljuba ne ĉesis labori por la liberigo de nia popolo el sub la faŝisma jugo.

Al mi k-do Grigorov mem diris foje, ke sen la helpo de Ljuba li ne estus povinta labori tiel aktive kiel esperantisto kaj komunisto. Ne hazarde li subskribis multajn siajn esperantlingvajn verkojn per la pseŭdonimo „Ljubin“ (de Ljuba): tiel forte li sentis la apogon de sia vivkamaradino. Post la reveno de G. Dimitrov el dudekjara elmigrado (novembro 1945) lia unua sekretario estiĝis A. Grigorov. Kunlaboranto de Grigorov estis lia edzino Ljuba. Georgi Dimitrov alte taksis tiujn du siajn kunlaborantojn — dignajn reprezentantojn de la malnova komunista gvardio.

Honoron al la vivheroaĵo de Ljuba!

N. Aleksiev

deziras korespondi

Bulgario

Nedko Kânev Gajdarov — str. Al. Stambolijski 37, 6280 *Gâlâbovo*, distrikto Stara Zagora (49-jara kuracisto — kun ĉi pri ĉi).

Penju Dimov Peev — 6290 *Obruĉište*, distrikto Stara Zagora (28-jara teknikisto — kun ĉi pri sporto, sportaj fotoj, bk ka).

Stanka Todinova Mateva — str. Struma 6-A, 6280 *Gâlâbovo*, distrikto Stara Zagora (23-jara teknikistino — kun ĉi pri kemio, muziko, bk).

Slavĉo Ivanov Slavĉev — str. Struma 6-A, 6280 *Gâlâbovo*, distrikto Stara Zagora (25-jara teknikisto — kun ĉi pri sporto, muziko, pm, bk).

Radi Ĵeljazkov Radev — str. Opâlĉenska 15, 6280 *Gâlâbovo*, distrikto Stara Zagora (21-jara teknikisto — kun ĉi pri sporto, turismo, bk).

Kojĉo Ĵelev Stojkov — str. Georgi Kirkov 19, 6280 *Gâlâbovo*, distrikto Stara Zagora (23-jara teknikisto — kun ĉi pri muziko, sporto, bk, fotoj).

Cvjatko Ivanov Cvetkov — str. Slavjanska 36, 6280 *Gâlâbovo*, distrikto Stara Zagora (44-jara teknikisto — kun ĉi pri tekniko, bk).

Krasimira Ilieva Grozeva — blok 14, vĥod A, ap. 6, 6280 *Gâlâbovo*, distrikto Stara Zagora (21-jara instruistino — kun ĉi pri matematiko, muziko, sporto, turismo, bk).

Ivan Iliev Gabrovski — 6290 *Obruĉište*, distrikto Stara Zagora (19-jara teknikisto — kun ĉi pri sporto, moderna muziko, bk).

Marko Dimitrov Jovĉev — bul. Engels 4, 4000 *Plodiv*.

NI GĀRDU LA PACON!

Teksto: Vladimir T. Georgiev

Muziko: Nekonato

Tempo de marŝo

G C G

Nin gvi- das la stan- dar- do be- la de a- mi-

C nekonato D Am

ke- co, pa- co, hel'. Al ĉi- u land' ni ve- nas

D7 T

ple- naj de fra- ta a- mo kaj fi- del. In-

C

ta- ŭ- en, kun im- pe- to nob- la, sa- mi- de- a- noj,

D G D7 G D7 1. G 2. G

i- ru ni! In- ta- ŭ- en i- ru ni! an ni!

Nin gvidas la standardo bela
de amikeco, paco, hel'.
Al ĉiu land' ni venas plenaj
de frata amo kaj fidel'.

Ni kiel Zamenhof laboras.
Komuna lingvo ligas nin.
Ni kreas la mirinde belan
progreson en la mond' sen lim'.

Nin ne disigas haŭtkoloro,
nek religi', nek sekso jam,
ĉar tiel diktas al la koro
la leĝo de la homa am'.

Sub nia verda stel' brilanta
en universo tuta nun
per nia lingvo Esperanto
batalas ni por pac' kaj lum'.

Jen, kamarado, mano mia, —
vi prenu, forte tenu ĝin!
En kunvivado harmonia
beieco unuigu nin!

Refreno:

Antaŭen, kun impeto nobla,
samideanoj, iru ni! Antaŭen iru ni!

El la bulgara: Rosica Georgieva

Noto de la redakcio. En n-ro 12/1976 ni aperigis la pacpoemon „Ni gardu la pacon!“ de Vl. T. Georgiev kun propono al la komponistoj fari melodion laŭ tiu teksto kaj sendi ĝin al ni.

En la redakcio estis riceviataj 5 proponoj el Bulgario, Sovetunio kaj GDR, kelkaj el kiuj tre bonaj. Laŭ la pritakso de kompetenta ĵurio unuan premion ricevas la teksto sendita de Nekonato, ĉar ĝi estas tre taŭga por amaskantado.

Ni petas Nekonaton sendi al ni mane skribitan leteron kaj anonci sian nomon kaj adreson.

La Redakcio